Jarkolekto 18 Kvarmonata N-ro 1, 1988

INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO

Organo de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj ILEI

REDAKTA KOMITATO

Carlevaro, T. (CH)
Formizzi, G. (I)
Lins, U. (D)
Ludwig, E. (F)
Maitzen, M. (A)
Mallia, C. (M)
Mizuno, Y. (J)
Szerdahelyi I. (H)

Redaktisto: István Ertl, Universitato ELTE, Budapest

Respondeca eldonanto (verantw. uitgever): E. Symoens, Putsesteenweg 131 A, B-2180 Kalmthout

IPR

Redaktejo: Esperanto-fako, Universitato ELTE/BTK
H-1364 Budapest, Pf. 107
☎ 36 1 180 966/185

Presado: Grafika Centro Antverpeno,
Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140,
B-2000 Antwerpen, ☎ 32 3 234 34 00

Enhavo

MEMORE PRI ISTVÁN SZERDAHELYI 1

Symoens E. – *Nekrologo* 2

Szabó I. – *Profesoro Szerdahelyi forpasis* 3

Centjara lingvo, dudekjara fako: Esperanto en la Universitato ELTE
(unu el la lastaj intervjuoj kun d-ro István Szerdahelyi) 8

GAZETARA KOMUNIKO
Esperanto-fako pluiras en la Budapeŝta Universitato 12

EL LA VIVO DE LA LIGO
Symoens E. – *Raporto pri la 21-a ILEI-Konferenco en Lodzo kaj pri la "Tago de la Lernejo" dum la Varsovia U.K.* 14

LINGVISTIKO
Dahlenburg T. – *Internaciismoj: ĉu helpo, baro aŭ rezerva fonto en lernado de Esperanto?* 23

INSTRUPRAKTIKO
Rosbach J.H. – *Lingvoinstruado per bildoj* 29
MacGill S. – *Instrui per aktorado* (dua parto) 32
Gonin J. – *Pri infanlibroj en Esperanto* 39

STATISTIKO
Pirlot G. – *Esperanto en universitatoj kaj superaj institutoj* 53

AKTUALAĴOJ
okazintaĵoj – diversaĵoj – informaĵoj – sciindaĵoj 57

AL SEKCIESTROJ KAJ MEMBROJ DE ILEI
Ertl I. – *Nova redakta politiko* 63

STIPENDIO 64

Kiom da novaj membroj vi varbis?

Jarkolekto 18 **januaro 1988** **N-ro 1, 1988**

«Internacia Pedagogia Revuo» estas sendependa forumo de la tutmonda pedagogaro. Ĝi aperas trifoje jare. La redakta komitato rajtigas sin mallongigi aŭ korekti la manuskriptojn nur laŭ lingvaj vidpunktoj. Manuskriptojn ni ne resendas. Reproduktaĵoj, tradukaĵoj estas permesataj eĉ rekomendataj kune kun fontindiko.



MEMORE PRI ISTVÁN SZERDAHELYI

Edward Symoens

Nia kara kaj estimata prezidanto, prof. d-ro István SZERDAHELYI, forpasis la 21-an de aŭgusto, post okmonata malsano kaj suferoj. Al lia edzino, liaj infanoj kaj familianoj ni prezentas niajn plej sincerajn kaj profundajn kunsenton kaj simpation.

Profesoro Szerdahelyi, unu el la plej konataj kaj plej aktivaj homoj en la nuna Esperanto-movado kaj unu el la plej elstaraj pedagogoj el la tuta historio de Esperanto, lasas grandegan vakuon, kiu ne facile estos plenigebla. Liaj grandaj aŭtoritato kaj prestiĝo, lia faka kompetenteco kaj lia eminenteco, liaj simpatia personeco kaj varma humanismo por ĉiam restos gravuritaj en la memoro de ĉiuj, kiuj havis la honoron kaj la plezuron frekventi lin.

Videblaj pri lia ĉeesto inter ni, restos liaj multnombraj libroj kaj artikoloj, kursoj kaj prelegoj, sed antaŭ ĉio la Esperanto-fako ĉe la Eötvös Loránd Universitato en Budapeŝto, kiun li antaŭ 20 jaroj fondis kaj poste majstre gvidis, en kiu formiĝis tiom da elstaraj disĉiploj. Li feliĉe ĉi-jare povis travivi la festan rememoron de tiu, por nia movado netaksebla, realigo.

Ni funebras pri la forpaso de nia kara kaj elstara prezidanto, sed la plej taŭga kaj efika maniero honorigi lin estas: pluiri la vojon, kiun li montris al ni; daŭrigi, kion li komencis; realigi, kion li intencis realigi en humanisma kaj tolerema spirito. Sur tiu fono kaj en tiu perspektivo, ni plenumi niajn respektivajn taskojn, eĉ pli intense kaj ĝisfunde ol antaŭe.

PROFESORO SZERDAHELYI FORPASIS

Imre Szabó

Kvankam ni ĉiuj sciis, ke lia sanstato grave malboniĝis, tamen ŝoke nin atingis la sciigo, ke la 21-an de aŭgusto 1987 forlasis nin poreterne D-ro István Szerdahelyi post 63 jaroj da laboroza vivo, kiun li dediĉis plene al la "orfa idiomo" Esperanto. Nian movadon trafis grandega perdo.

Li naskiĝis la 20-an de aŭgusto 1924 en la vilaĝo Avasfelsőfalu (nun: Negreşti en Rumanio). Lia infanaĝo multe similis al tiu de Zamenhof, ja ankaŭ li devis ellerni plurajn lingvojn en la plurnacieca vilaĝo. Dekomence li parolis la hungaran kaj la rumanan lingvojn. En la rumana, franclingva kaj hungara baz- kaj mezlernejoj li konatiĝis ankaŭ kun la klasikaj lingvoj. Li abiturientiĝis en 1942.

Li aliĝis al la Ŝtatadministra kaj Jura Fakultato de la Universitato en Kolozsvár (nun: Cluj-Napoca en Rumanio), sed li povis studi tie nur unu jaron pro la dua mondmilito. Li daŭrigis la studadon nur en 1947, kiam li revenis el la militkaptitejo, kie li — eluzante la eblon — alproprigis la rusan. Li akiris sian unuan diplomon en la jura fakultato de Universitato Péter Pázmány (antaŭulo de ELTE) doktoriĝante en 1951. Paralele li vizitis inter 1947-1949 la kurson pri diplomatio kaj ekstera politiko de la Hungara Instituto pri Eksterlandaj Aferoj. Poste li diplomiĝis en 1953 pri la rusaj lingvo kaj literaturo en la Filologia Fakultato de la Sciencuniversitato Loránd Eötvös (ELTE). Tamen en 1950 jam aperis lia unua rusa lernolibro (151 paĝoj), kiun sekvis du aliaj volumoj en 1952 (kune 405 paĝoj). Poste dum la sesdekaj jaroj el liaj lernolibroj konatiĝis kun la rusa ĉiuj klasoj de la gimnazioj. Lia interesiĝo pri instrumetodikaj temoj restis ĝis la fino.

Foje li trovis Esperanto-lernolibron en la biblioteko de sia onklo Lajos Dér. tio okazis en la jaro 1949. La junulo dum mallongega tempo alproprigis la lingvon, interesegan por li. Sekvajare oni komisiis lin gvidi kurson por gelernantoj kaj instruistoj. Tiu kursgvidado daŭris senĉese ĝis 1961. En 1963 li verkis kvar kajerojn por Esperanto-kursoj.

Li staris ĉe la lulilo de la reviviĝanta Esperanto-movado en Hungario, li estis membro de HEA ekde tiam. Ekde la unuaj momentoj li strebis enkondukigi la oficialan instruadon de la Internacia Lingvo en la lernejojn, jam per la helpo de prestiĝa socia organizo. Kaj tiu strebado difinis lian pluan vivovojon. La 14-an de novembro 1961 okazis kunsido de instrua komisiono de HEA, kiu decidis ke, por antaŭenigi la aferon de Esperanto, estas nepre bezonate modernigi la instruan politikon, precipe rilate la lernejojn. La komitato decidis eldoni gvidlibron por la superaj ekzamenoj. Tiu lernilo instruis generaciojn de esperantistoj ne nur en Hungario, sed ankaŭ eksterlande (ĝian instrumetodikan ĉapitron verkis István Szerdahelyi). Laŭ lia propono okazis modifo ankaŭ en la ekzamensistemo kaj ekde la lernojaro 1964/65 funkcias la nuna trigrada (A,B,C) kurso- kaj ekzamensistemo.

D-ro Szerdahelyi iniciatis, fondis kaj prezidis Esperantologian Fakkomisionon de HEA por kontroli kaj gvidi la lingvokulturon kaj sciencan esploradon. En 1966 okazis Universala Kongreso de Esperanto en Hungario; verŝajne ankaŭ ĝi multe helpis la realiĝon de amaso da proponoj: en 1966 ankaŭ Esperanto aperis inter la objektoj de la ŝtata lingvoekzameno. La Esperantan fakon gvidis doktoro Szerdahelyi. En la oficiala bulteno de la Kleriga Ministerio aperis en 1963 la ministeria dekreto (25386/1963), laŭ kiu oni povas instrui Esperanton en lernejoj laŭ liber-

vola elekto, sub la samaj kondiĉoj kiel la aliajn lingvojn. Szerdahelyi rekonis, ke la sukceso de la lerneja Esperanto-programo baze dependas de tio, ĉu estas sufiĉe da kapablaj instruistoj en la lernejoj. Tial li difinis la celon: enkonduki la instruadon de Esperanto en la universitatojn kaj porinstruistajn altlernejojn. Tiucele li organizis, kadre de la Komunisma Junulara Organizo de la Jura Fakultato, sciencan studrondon de Esperanto, kiu eldonis eĉ revuojn (*Studento* kaj *Universo*) en la jaroj 1964-65.

Doktoro Szerdahelyi, interkonsentinte kun la tiama sekretario de HEA, Antal Koós, sendis petleteron al la Kleriga Ministerio pri la enkonduko de la lingvo en la Filologian Fakultaton. La letero estis transdonata, por akiri ekspertan opinion, al d-ro Géza Bárczi (esperantisto jam antaŭ la unua mondmilito, redaktoro de *La Verda Standardo,* tradukinto eĉ de kelkaj poemoj), fama hungara lingvisto, akademiano, universitata profesoro. Laŭ lia favora opinio la ministerio permesis la enkondukon en la Filologia Fakultato de ELTE, petante ke HEA delegu personon por la praktikaj farendaĵoj. HEA delegis d-ron Szerdahelyi, kiu estis komisiita gvidi kaj organizi la fakon. Jen, en septembro 1966 fondiĝis la Esperanto-Fako, kiu dum la pasintaj pli ol dudek jaroj de sia ekzisto edukis pli ol cent Esperanto-instruistojn. Ekde 1971 li estis nomumita universitata adjunkto, en 1983 li fariĝis docento. Li mem ellaboris preskaŭ ĉiujn bazajn studmaterialojn por la Fako. En 1972 li aperigis sur 307 paĝoj la lernolibron *Esperanto – Enkonduko kaj Ekzercoj,* en 1973 *Metodologio de Esperanto* (377 p.), en 1980 *Enkonduko en la Interlingvistikon* kaj *Miscellanea Interlinguistica* (red. 513 p.), en 1985 *Bazaj nocioj de la aplikata lingvistiko.* Intertempe li aperigis kiel redaktoro tri ampleksajn volumojn *Krestomatio de Esperanto* (1267 p.), kaj tri volumojn de *Esperantologiaj Kajeroj* (887 p.).

Dume li daŭre laboris ankaŭ landskale kaj internacie. Lia lernolibro *Eszperantó 1* por bazlernejoj aperis inter 1966 kaj 1979 en kvar eldonoj kaj en la rekorda nombro de 77 800 ekzempleroj. *Eszperantó 2* aperis en 1968 kaj 1980 en 21 900 ekzempleroj. La esperantlingva varianto de tiuj lernolibroj estis la bazo por la Internacia Pedagogia-Didaktika Eksperimento, kiun li gvidis fake inter 1967 kaj 1977. La rezultoj de la eksperimento brile pruvis la propedeŭtikan valoron de Esperanto en la instruado de fremdaj lingvoj. La bazajn dokumentojn li ellaboris en ses volumoj. Ekde 1970 li estis prezidanto de la Internacia Ekzamena Komisiono de ILEI, de 1973 direktoro de la Scienca Esplorinstituto de ILEI kaj de 1985 prezidanto de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj.

Samtempe li dediĉis multege da energio ankaŭ por la hungarlingva diskonigo de Esperanto. Li redaktis la Esperantan parton de la *Világirodàlmi Lexikon* ("Mondliteratura Leksikono"). En 1977 li aperigis 415-paĝan libron ĉe la eldonejo GONDOLAT sub la titolo *Bábeltől a világnyelvig* ("De Babelo ĝis la mondlingvo" – 415 p.). Krome li verkis amason da hungarlingvaj sciencpopularigaj artikoloj koncerne Esperanton.

Li estis membro de pluraj lingvistikaj societoj: *Association Internationale de Linguistique Appliquée* ("Internacia Asocio pri Aplikata Lingvistiko"), *Association Internationale de Cybernétique* ("Internacia Kibernetika Asocio"), *Société Internationale de Linguistique Fonctionnelle* ("Internacia Societo de Funkcia Lingvistiko"), *Magyar Nyelvtudományi Társaság* ("Hungara Lingvistika Societo") kaj *Modern Filológiai Társaság* ("Moderna Filologia Societo"). Li daŭre kunlaboris kun la Paderborna Pedagogia-Kibernetika Instituto, kaj li estis kunfondinto de la Internacia Scienca Akademio en San Marino. Rekonante lian sciencan agadon la 16-an de aprilo 1986 la Akademio de Esperanto elektis lin sia membro. Eĉ UEA donacis al li la titolon "honora membro". Lia poresperanta agado estis distingita per *Diplomo de HEA* (1973) kaj *Pro Esperanto* (1980). La Konsilio de Ministroj de Hungara Popolrespubliko donacis al li la ordenon "pro eminenta laboro" (1984).

Li estis konata ankaŭ kiel preleganto, ofte rolanta en la Someraj Universitatoj de la Universalaj Kongresoj. Li faris plurajn prelegvojaĝojn tra Sovetio, Svislando, Finnlando, Francio ktp.

De 1969 li estis komitatano, de 1986 vicprezidanto de HEA kaj prezidanto de ĝia instrua kaj Lingvistika Komisiono. Li en tiu ĉi nova funkcio havis tiom multege da planoj kiel malmultaj homoj. Li direktis la laborojn de la granda Hungara-Esperanta Vortaro, kiu enhavas ĉ. 70 000 leksemojn kaj aperos en 1988. Paralele li laboris pri pluraj sciencaj verkoj, kiuj same aperos jam nur post lia morto. Eĉ ne eblas denombri ĉiujn liajn laborojn, tio — same kiel ilia analizado — estos jam tasko de la esplorantoj de lia vivoverko.

Li vortumis sian celon jene: "oficialigo de la lerneja Esperanto-instruado, antaŭpreparo kaj pluperfektigo de la instruistaro, scienca esploro". Kiel metodon li proponis: "ĉiam agi sen atendi la aliajn". Tion li faris obstine, senlace por la difinita celo. Tio estas ekzemplodona kaj modela vivo por ni ĉiuj, ja li ne plu estas inter ni, li vivos plu pere de ni, en niaj agoj kaj strebadoj.

(El *Budapeŝta Informilo*, sept. 1987)

Unu el la lastaj intervjuoj kun d-ro István Szerdahelyi:

CENTJARA LINGVO, DUDEKJARA FAKO: ESPERANTO EN LA UNIVERSITATO ELTE

Nia interparolo aktualas pro du datrevenoj: la dudeka de la Esperanto-fako en la Universitato ELTE, kaj la centa naskiĝtago de la Internacia Lingvo mem. Kiel lingvo, kiel fako, Esperanto estas do same juna.

I.SZ. – Sendube, en la vivo de lingvoj cent jaroj ne estas longa tempo. Se ni tamen konsideras, ke Esperanto estas la sola artefarita lingvo, kiu ĝisvivis sian centan datrevenon, ni devas diri, ke tiu juneco ne estas io hontinda. Eĉ, la juneca dinamismo de Esperanto ebligis (male al aliaj lingvoj, kiuj kreiĝis dank'al iu komunumo), ke ĝi kreu per siaj propraj fortoj kaj kulturon kaj komunumon da parolantoj — "mikrosocion" — kiu etendiĝas, eĉ se nur diaspore, sur la tuta mondo. Malgraŭ tio, ni en la universitato konsideras Esperanton kiel lingvon en eksperimenta fazo. Sed tiu ĉi eksperimento estas eksterordinare grandskala, kaj Esperanto meritas el ĉiuj aspektoj, ke la lingvoscienco okupiĝu pri ĝi serioze.

Ĉu ankaŭ aliaj lingvistoj samopinias?

I.SZ. – Kvankam la lingvon iniciatis nefakulo, la pollanda okulisto Zamenhof, ne necesis pli ol dek-dudek jaroj por altiri la atenton de profesiaj lingvistoj. En la dudekaj jaroj, Antoine MEILLET skribis en sia fama verko *La lingvoj de la mondo*: "Ĉiuj teoriaj diskutoj superfluas — Esperanto funkcias." Kompreneble, la lingvistajn opiniojn ĉiam influis la regantaj sciencaj skoloj de la koncerna epoko. La novgramatikistoj, kiuj insistis pri la teorio de la 'natura' evoluado de lingvoj, ne montris apartan simpation al ĝi, sed iliaj kritikantoj — kiel MEILLET, BRÉAL, Baudouin DE COURTENAY; pli malfrue JESPERSEN kaj SAPIR — ne plu opiniis artefaritajn lingvojn nevivipovaj homunkuloj. Kiam en la sesdekaj jaroj elformiĝis la problemaro de aplikata lingvistiko, ekzemple de lingvopolitiko kaj lingvomodelado, evidentiĝis, ke Esperanto povas ludi gravan rolon ambaŭterene. Kiel lingvo politike neŭtrala, ĝi proponas solvon al la Babelo ĉi-epoka sur sennombraj kampoj — en la turismo, komerco, scienco ktp. Kiel modelo de hindeŭropaj lingvoj eble ĝi estas la plej taŭga por esplori la problemojn de lingva minimigo kaj ekonomio. Materialo ne mankas por lingvistoj; dum cent jaroj de sia ekzisto Esperanto ja estis elprovita en preskaŭ ĉiuj eblaj funkcioj, eĉ en tiaj, kiuj unuavide ŝajnus malproksimaj de sia origina destino, kiel ekzemple komunikado en plurlingvaj familioj. Konsultlibroj pri aplikata lingvistiko ne plu preteratentas Esperanton. La interesiĝo tiukampe ŝajnas daŭre kreski.

Ĉu la ekesto mem de la fako ŝuldiĝas al tiu interesiĝo?

I.SZ. – Ne rekte. La 51-a Universala Kongreso en Budapeŝto en 1966, havis bonan gazetaran eĥon, kiu kontribuis al la favoriĝo de la cirkonstancoj por enkonduki Esperanton en nian universitaton. Hungara Esperanto-Asocio sendis, en februaro de 1966, peticion al la Ministerio pri Instruado kaj Klerigado, kiu plu adresis ĝin al la universitato. La rektoro petis opinion de la fama lingvisto Géza BÁRCZI, konata esperantisto de junaĝo kiu, ĝis tiam preskaŭ sola, okupiĝis ankaŭ science pri Esperanto. (BÁRCZI timis pri la misefiko de grandaj lingvoj sur la hungara, kaj en Esperanto li vidis ilon por gardi la identecon de malgrandaj popoloj.) Laŭ lia favora opinio, la fako "Esperantaj lingvo kaj literaturo" enkondukiĝis en septembro de 1966, komence kun naŭ studentoj.

Kaj kiom da fakanoj sekvis?

I.SZ. – Entute 98, inter ili dek eksterlandanoj: poloj, japano, vjetnamano. Dek studentoj doktoriĝis, kvindek verkis faklaboraĵojn, kvankam la plejmulto ne forlasis sian ĉeffakon.* Tio bone montras, kiom larĝas la neesploritaj terenoj en esperantologio. La studentoj

sentas, ke ili malkovras novajn teritoriojn de la scienco. La varieco de la studprogramo logas en multajn direktojn: eblas okupiĝi pri ĝeneralaj problemoj de lingvoinstruado, observi tempajn kaj spacajn ŝanĝiĝojn de la lingvo sur la modelo de Esperanto, profundiĝi en la literaturhistorio. (La lingvo ja funkciis kaj funkcias ĉefe, kompreneble, en skriba formo, kreante valorajn originalaĵojn kaj tradukojn.)

Sed kion povas fari eks-studento kun diplomo pri Esperanto?

I.SZ. – Principe ĝi samrange rajtigas al mezgrada instruado, kiel diplomoj de aliaj fakoj. Evidente, oni ne povas sin vivteni per Esperanto, kiun oni instruas fakultative, en malmultaj lokoj. Tamen estas pensige, ke en la bazlernejoj dumil infanoj lernas Esperanton, kiu okupas tie la kvaran lokon post la deviga rusa kaj la elekteblaj angla kaj germana lingvoj. Nia fako, kiu enkadriĝas en lingvistikan katedron, kompreneble pli taŭgas por elformi esperantologojn, teoriajn fakulojn. Multaj el niaj diplomitoj agadas sur la instrua, junulara kaj aliaj kampoj de la movado. Ankaŭ la literaturo ne estas neglektata: ni povas fieri pri renomaj tradukistoj, eĉ pri literatura premiito.

Kiel evoluas la rilatoj de la socio al Esperanto?
Kian futuron kaj ŝancojn vi antaŭvidas por la lingvo?

I.SZ. – La Esperanto-movado atingis la nivelon, kiun ĝi povis per la propraj fortoj, ĝin ja neniam apogis politikaj aŭ financaj potencoj. La kvalita kresko ankoraŭ atendata devas esti la paŝo-post-paŝo rekonigo kaj instituciigo de Esperanto. La plej konvinka modo atingi tion, laŭ mia opinio, estas pruvi la taŭgecon de la lingvo en kiel eble plej multaj aplikoj: en la *turismo* (ekz. "Pasporta Servo"), en la *scienco* (DLT, Esperantaj resumoj en revuoj), en la *literaturo* (kie ĝi same povas servi kiel pontlingvo kaj helpi la diskonigon de 'malgrandaj' kulturoj). Ni, hungaroj, ĉiam estis iniciatemaj en la historio de Esperanto. La literaturan lingvon praktike kreis en la tridekaj jaroj la budapeŝta skolo kaj Kolomano KALOCSAY; la scienca ekokupiĝo pri la lingvo

samtempis kun la fondo de nia fako. Ankaŭ nun, kiam pleje urĝas *instituigi* Esperanton, ni hungaroj devus fari decidan paŝon. Se tio okazos, kaj se Esperanto plue pruviĝos vivipova kaj evoluiva — kion mi firme kredas — ne povas esti dubo, ke ĝi plenumos la rolon de neŭtrala internacia pontlingvo en ĉiam pli kaj pli da rilatoj.

(Laŭ la hungarlingva intervjuo de István Ertl,
aperinta en *Egyetemi Lapok*, la 2-an de februaro 1987)

---

* En la universitato ELTE oni kutime studas du aŭ tri fakojn samtempe. Tria fako estas komencebla en la dua (*B-fako*) aŭ en la tria (*C-fako*) jaro de la studoj. Esperanto estas *C*-fako. Por diplomiĝi, ĉiu studento devas prezenti faklaboraĵon en iu el siaj fakoj.
[La redaktoro]

PARDONPETO

Tiu ĉi numero de IPR grave malfruas. Kulpas iu nekonata mano kiu malaperigis dikan koverton, bedaŭrinde ne registritan, ie inter la redaktoro en Budapeŝto kaj Grafika Centro Antverpeno. Por ŝpari la perditan tempon, la respondeculoj de ILEI preferis aperigi tiun ĉi numeron sen kontrolo kaj sekve jam anticipe pardonpetas por eraroj kiuj eventuale enŝteliĝis. La venonta numero devus denove aperi ĝustatempe laŭplane.

Gazetara Komuniko

ESPERANTO-FAKO PLUIRAS EN LA BUDAPEŜTA UNIVERSITATO!

D-ro SZERDAHELYI, universitata docento, estis gvidanto de la Esperanto-fako en la Budapeŝta Universitato Eötvös Lóránd ekde ĝia fondo en 1966. Li famigis tiun fakon ankaŭ en internaciaj pedagogiaj kaj fakaj rondoj per la tiea scienca laboro, per universitataj lernolibroj kaj diplomigis preskaŭ 100 gestudentojn.

Post lia morto en aŭgusto 1987 la sorto de la fako estis duba, sed per lastmomenta decido la instrua kaj scienca laboro pluiras, eĉ kun du plentempaj postenoj, kiujn plenumas du eksstudentinoj, liaj kunlaborantinoj: Ilona KOUTNY kaj d-ino Zsuzsa VARGA-HASZONITS.

La fako estas unika en tio, ke ĝi donas samvaloran diplomon kiel aliaj fakoj de la universitato kaj ofertas kompletan esperantologian studtemaron por kvar jaroj. La studoj inkluzivas krom la lingvoinstruado priskriban gramatikon, literaturon, movadhistorion, metodologion, interlingvistikon kaj temojn de la ĝenerala kaj aplikata lingvistiko. Tiel ĝi estas integra parto de la katedro "Ĝenerala kaj Aplikata Lingvistiko", en kies kadro ĝi funkcias. Eblas ankaŭ doktoriĝi pri esperantologio.

Nuntempe, krom la 13 tagaj studentoj, ankaŭ 13 korespondaj studentoj partoprenas trijaran studprogramon. Tie la posedo de universitata diplomo kaj la scio de Esperanto estas antaŭkondiĉoj.

La memstara laboro de studentoj okazas en scienca studenta rondo — temas ĉefe pri pedagogio kaj lingvistiko, kaj ekde nun sub la gvido de Ilona KOUTNY ankaŭ pri komputilaj aplikoj (ekz. uzo de sintezita parolo en instruado, problemoj de maŝina tradukado). Aperadas studenta revuo *Opus Nigrum,* redaktata de István ERTL (ankaŭ redaktoro de IPR).

Eksterlandaj studentoj estas bonvenaj en la fako laŭ la kondiĉoj de la Universitato: (1) Studentoj, kiuj venas laŭ interŝtataj kontraktoj kaj ricevas stipendion, povas alpreni esperantologion kiel suplementan fakon; (2) Hungaroj, loĝantaj en la najbaraj landoj rajtas studi senpage, sed devas prizorgi sin mem; (3) Ĉiuj aliaj eksterlandanoj devas pagi por la studado.

La studadon povas kompletigi la vigla esperantista vivo en Budapeŝto (kulturaj kaj sciencaj aranĝoj), eldonaĵoj kaj riĉa librokolekto.

Por pluaj informoj bv. turniĝi al:
Esperanto-Fako, ELTE, Pf. 107, H-1363 Budapest, Hungario.

El la vivo de la Ligo

Edward Symoens

RAPORTO PRI LA ILEI-KONFERENCO EN LODZO (POLLANDO) (17-24 julio 1987)

1. **Loĝejo kaj konferencejo** — Lodza Universitato, Fizika Instituto kaj studenta domo

2. **Organiza komitato**

Tadeusz EJSMONT	prezidanto
Wlodzimierz WESOLOWSKI	vicprezidanto
Lilina PALCZEWSKA	vicprezidanto
Halina EJSMONT	sekretariino
Pelagia BIENKOWSKA	Kasistino
Ignacy Ryszard DANKA	reprezentanto de Lodza Universitato
Jan SZAKOWSKI	eldon-sferoj
Marta PODGORSKA	ekspozicioj
Ewa WALEWSKA	ekskursoj
Danuta STEPIEŃ	lerneja kunlaboro
Maria HEINRICH	Internacia Lerneja Semajno
Henryk WALKOWSKI	organizaj aferoj

3. **Partoprenintoj**
151 el 17 landoj

4. **Estraro de ILEI**

Vicprezidanto	Edward SYMOENS, prezidas la konferencon anstataŭ Prof. SZERDAHELYI, forestanta pro malsano
Ĝenerala sekretario	Catina DAZZINI
Vicsekretario	Marin BÂCEV
Kasisto	Bertil ANDREASSON

5. **Programeroj**

5.1 *Konferenco de ĵurnalistoj* – Informado pri Esperanto ĝenerale kaj la Konferenco aparte.

5.2 *Solena malfermo,* sub la prezidanteco de Tadeusz EJSMONT, en ĉeesto de la rektoro de la Lodza Universitato, la prezidanto de la Nacia Konsilantaro de urbo Lodzo, la vicprezidanto de la urbo Lodzo, la unua sekretario de la Lodza Distrikta Komitato de Unuiĝinta Laborista Partio;
- dankvortoj de la prezidanto al la ĉeestantaj aŭtoritatuloj,
- salutvortoj de la reprezentantoj de la landaj sekcioj,
- parolado de la vicprezidanto. Ĉi tiu klarigas la foreston de la prezidanto SZERDAHELYI, laŭtlegas la mesaĝon, kiun li ĵus ricevis de la prezidanto kaj proponas sendi telegramon kun bondeziroj por rapida resaniĝo. Li dankas al ĉiuj homoj, kiuj ebligis realigi la 21-an Konferencon kaj pritraktas kelkajn bazajn problemojn rilate al la kadrotemo de la Konferenco: "La scienca esploro de Esperanto el pedagogia, didaktika kaj lingvopolitika vidpunktoj".

5.3 **Prelegoj**

Stefan MACGILL	Humuro, ludo kaj dramo en la instruado
Liang ZIMING	Postuloj pri Esperanto-instruado de ĉinaj altlernejoj kaj motivoj de la postuloj
Till DAHLENBURG	La rolo de konversaciaj libroj
Joachim WERDIN	Psikotronika memkuracado
Irena SZANSER	Glotodidaktikaj kaj specifaj aspektoj de Esperanto-instruado
Marin BÂCEV	Pri la sugestopedia metodo

5.4 **Distrajoj**

Interkona vespero

Pluraj filmsesioj de la Pola Asocio pri etnografia kaj sociologia filmo

5.5 **Kulturaj manifestacioj**

- Kant- kaj deklamvespero omaĝe al la pola poeto Julian TUWIM
- Esperanta Virina Koruso «Eĥo» kantas kanzonojn de diversaj nacioj
- Astra Balo, spektaklo preparita de la Amatora Scengrupo «Espero» ĉe la Lodza Filio de PEA
- "Feliĉa Okazintaĵo", teatraĵo realigita de profesiaj aktoroj el *Teatr Powszechny* (Teatro Universala) en Lodzo
- "Travivaĵoj de la brava soldato Ŝvejk", mondfama unupersona teatraĵo, kun profesia aktoro Mirosław HENKE.

5.6 **Ekskursoj**

Duontaga ekskurso en Lodzo

Tuttaga ekskurso de Lodzo al Varsovio, kun i.a. vizito al la naskiĝdomo de Fryderyk CHOPIN en Żelazowa Wola kaj piano-recitalo

5.7 **Kvar ĝeneralaj kunvenoj**

Multaj, tre aktivaj partoprenintoj pridiskutis la sekvajn temojn, surbaze de labordokumento, kiun preparis la vicprezidanto:

a) *Esperanto Regularo por unueca ekzamen-sistemo* – proponita de la prezidanto kaj kunsendita en n-ro 2/3 de IPR (1987). Sekve al tiuj diskutoj, amendota teksto estos preparata kaj kritike rediskutata en malgranda faka komisiono.
Intertempe, la prilaborendaj aldonaĵoj estos preparataj kaj la tuto estu preta ĝis la 1-a de junio 1988 por definitiva akcepto dum la 22-a Konferenco en Nederlando.

b) *La kadra instruprogamo de la pedagogia-metodika kurso por rajtigi Esperanto-kursgvidantojn* – verkita de Mgr. Irena SZANSER (PL) estos uzata por trejni estontajn kursgvidantojn. La akompananta materialo parte estas preta kaj jam juĝita de du spertuloj pri metodiko. Ĝi dum la venontaj monatoj estos tajpata kaj multobligata por eksperimenta uzo. Mgr. SZANSER ricevis inviton de la Kultura Centro Esperantista en La Chaux-de-Fonds (CH) por gvidi en junio 1988 pedagogian kurson por kursgvidantoj surbaze de tiu programo kaj materialo.

c) *Alloga informilo pri ILEI* – nun estas preparata kaj eldonota, dank'al jam ricevita subvencio de la Eduka Fonduso Carson el Kanado. Stefan MACGILL kaj Márta KOVÁCS preparis tekston kaj cirkuligis ĝin por komentoj kaj kritiko.
Ĝi nun estas preta kaj aperos ĉi-jare. [vd paĝon 6 — La red.]

d) *Varbado de novaj membroj.* – El la diskutoj evidentiĝas, ke la varbadon malhelpas la fakto, ke la instruistoj plej ofte estas membroj de sia Landa Asocio, kiu rekte aŭ pere de iu Eduka Komisiono organizas kursojn kaj faras programojn. La instruistoj ne klare vidas kial aliĝi al ILEI.
Pro tio, ni urĝe informiĝos pri la ĝusta situacio en la diversaj landoj rilate al la Esperanto-instruado. Kompare al la taskoj de la Landaj Asocioj, ILEI havas apartajn, specifajn taskojn, kiuj meritas apogon kaj membriĝon. Pri tiuj taskoj ni traktos en alia dokumento.

e) *Internacia Pedagogia Dokumenta Centro.* – ILEI nepre bezonas konstantan adreson kaj domon, en kiu la arkivoj de la asocio, pedagogia biblioteko, revuoj kaj dokumentoj rilate al ĉiuj aspektoj de la instruado de Esperanto trovos lokon, kie la tuta esperantistaro kaj ne-esperantistaj fakuloj povos informiĝi kaj dokumentiĝi. Ni pensas pri aranĝo kun iu jam funkcianta Esperanto-centro, por profiti la ekzistantan infrastrukturon kaj deĵorantaron. Ni esperas trovi solvon antaŭ la 22-a ILEI-Konferenco en 1988.

f) *Internacia Terminologia Centro* de UEA meritas la plenan apogon de ILEI, ĉar ni nepre bezonas pedagogian terminologian leksikonon, kiu pli facile efektiviĝos kadre de tiu Centro ol izole. Edward SYMOENS reprezentas ILEI por ĉiuj ĝeneralaj kaj organizaj problemoj kaj Marin BÂCEV por la metodikaj

aferoj. Aparta dokumento pritraktos ĝisfunde la specifajn taskojn de ILEI tiurilate.

g) *La inventarado* de la oficialaj elementaj kaj mezgradaj Esperanto-kursoj grandparte fiaskis pro ne-respondo de la sekcioj. Kelkaj reagis, sed nur Hungario faris la petitan laboron komplete kaj eĉ modele! Ni baldaŭ rekomencos la enketon.

h) *La kunlaboro kun UEA* kontentige evoluas. En Varsovio, ILEI organizis por la unua fojo "Tagon de la Lernejo", dank'al la sindono de Zsuzsa BARCSAY kaj Stefan MACGILL. — La *internacian ekzamenon* organizis Irena SZANSER.
Informoj pri tiuj ĉi du okazaĵoj troviĝas en apartaj raportoj.

i) Okaze de ĉiuj diskutoj, la vicprezidanto daŭre insistis pri la neceso pli kaj pli profesiigi nian laboron, disponi pri respondecaj kunlaborantoj por specifaj taskoj, obstine klopodi realigi la faritajn decidojn, plani la laboron ĝustatempe por eviti improvizaĵon, prepari gviddokumentojn pri ĉiuj regulaj okazontaĵoj: Konferenco, Tago de la Lernejo, ktp. Similan dokumenton li jam preparis ĉi-jare pri la Konferencoj de ILEI.
Por la unua fojo, ĉi-jare, la aliĝilo por la venonta 22-a Konferenco en Nederlando estis preta kaj disdonita; LKK por la 23-a Konferenco en Britio (1989) jam funkcias kaj la kadrotemoj por la venontaj renkontiĝoj kaj okazaĵoj estas konataj:
22-a Konferenco: "Tradiciaj kaj modernaj instrukonceptoj en la instruado de Esperanto".
23-a Konferenco: "Motivado en la lerneja instruado de Esperanto".
Tago de la Lernejo (Roterdamo 1988): "La ĝustaj formoj de la lerneja politiko koncerne la oficialan enkondukon de Esperanto en lernejojn".
Ideoj, sugestoj, kaj kunlaboro estas bonvenaj!

6. **Cseh-seminarioj**
Seminario *A* (enkonduka), por ĉiuj Esperanto-instruantoj kiuj

ŝatis konatiĝi kun la metodo aŭ ekzerci ĝin.
Seminario C kun diploma ekzameno, okazis la 23-an de julio.
Esperanto-kurso por komencantoj laŭ Cseh-metodo.
La sperto estis fruktodona kaj estos daŭrigata dum la venontaj konferencoj.

7. **Ekspozicio**
La ideo organizi ekspozicion pri faka metodika Esperanto-literaturo, instrufontoj, lernolibroj, infanliteraturo, didaktikaj ludiloj, demonstra materialo, infandesegnaĵoj kun la temo "Esperanto centjara", estas bonega, sed ne facile realigebla, kaj certe ne ĉiujare farebla.
La koncepto kaj realigo estu aparte pritraktota, ĉar ĉi-jare ĝi ne estis kontentiga, ankaŭ pro la fakto ke ĝi troviĝis en loko, kie la partoprenintoj ne regule preterpasis.

8. **Internacia Lerneja Semajno** (I.L.S.)
Ankaŭ ĉi tiu ideo, kunigi infanojn el diversaj landoj por ke ili sekvu kursojn, faru vizitojn, ludu kaj amuziĝu, estas nepre realiginda. Pro diversaj kaŭzoj, ankaŭ pro manko de sperto, la ĉi-jara I.L.S. nur parte sukcesis. Ne estis sufiĉe da infanoj, la lingvo-kono estis tro malsama, la akurateco ne ĉiam sufiĉe granda.
La direktoro, Marin BÂCEV, faru kritikan analizon de la pozitivaj kaj negativaj aspektoj de la eksperimento por plibonigi ĝin venontfoje.

9. **Komitat-kunsidoj** (20-a kaj 21-a de julio)
Ĉeestis delegitoj el Belgio, Britio, Ĉinio, Francio, FR Germanio, Hungario, Italio, Jugoslavio, Nederlando, Pollando, San Marino, Korea Respubliko kaj Svedio. Jenaj punktoj estis pritraktataj kaj pridiskutataj:

9.1 Honorigo *post mortem* de Helmut SONNABEND, antaŭa prezidanto de ILEI.

9.2 Neceso adapti la statuton kaj la regularon al la nunaj situacio kaj bezonoj de ILEI.

Aparta dokumento aperos pri ĉi tiu grava temo.

9.3 En 1988 okazos elektoj de nova Estraro. Komisiono ne-estrara pristudos la situacion, ricevos kaj ekzamenos la kandidatecojn kaj faros proponojn al la asembleo, kiu kunvenos dum la 22-a Konferenco en Nederlando. Pliaj informoj sekvos pli malfrue.

9.4 La prezidanto, en letero al la vicprezidanto, sugestas kontakti la I.E.C. (Internacia Esperanto-Centro) en Hago (NL) por tie organizi la projektitan centran oficejon de ILEI. La vicprezidanto faros la proponon kaj pridiskutos la aferon surloke en Hago.

9.5 La organizado de la "Tago de la Lernejo" kaj de la Internacia Ekzameno estas pridiskutita. Pri la unua okupiĝos Stefan MACGILL kaj Zsuzsa BARCSAY; pri la dua Irena SZANSER.

10. **Ferma kunsido**

La prezidanto de LKK, d-ro Tadeusz EJSMONT, malfermis la lastan kunsidon kaj dankis al ĉiuj kunlaborintoj.

La ĝenerala sekretario mallonge raportis pri la Konferenco.

La kasisto klarigis per ciferoj la financan situacion de ILEI: sen esti brila, tiu estas kontentiga.

Mila VAN DE HORST-KALINSKA raportis pri la Cseh-seminarioj kaj kursoj, kaj la vicprezidanto transdonis instrurajtigan diplomon al tiuj kursanoj, kiuj kontentige sekvis la seminarion *C*.

La vicsekretario Marin BÂCEV raportis pri la "Internacia Lerneja Semajno", prezentis siajn kunlaborintojn al la publiko kaj transdonis ateston al la gelernintoj. Li profitis la okazon por atentigi denove pri la "Sonorilo de la Paco" kaj alvoki al subteno de tiu bela iniciato.

La vicprezidanto diris la lastajn vortojn, memorigante pri du forpasintaj kolegoj — Helmut SONNABEND kaj Peter ZLATNAR — kaj dankis al ĉiuj LKK-anoj kiuj ebligis la sukcesplenan 21-an Konferencon. Li aparte honorigis kaj dankis gesinjorojn EJSMONT, transdonis al s-ro EJSMONT la "Dia Komedio"-n de Dante kaj fermis la 21-an Konferencon.

"TAGO DE LA LERNEJO"

Interkonsente kun UEA, la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj organizis dum la UK en Varsovio la "Tagon de la Lernejo". Antaŭ proksimume 600 personoj, la vicprezidanto de ILEI, Edward SYMOENS, post kelkaj enkondukaj vortoj, malfermis la Tagon je la 10-a matene kaj prezentis Stefan MACGILL kaj Georges SOSSOIS, kiuj kune organizis la matenan kunsidon pri la ĝenerala temo "Humuro, ludo kaj dramo en la instruado".

Malgraŭ la manko de materiaj rimedoj (i.a. nigra tabulo, grandformata papero, ktp.) la du aktoroj — ĉar aktoroj ili estas! — dum du horoj per skeĉoj, amuzaj klarigoj kaj ekzemploj, senhalte kaptis la atenton de la vasta publiko, kiu ofte ridegis, sed samtempe eklernis kiamaniere trarompi la monotonecon kaj enuon, kiuj tro ofte karakterizas la lingvo-lecionojn.

La posttagmeza sesio estis pli ĝenerale informa. La vicprezidanto — sub la temo "ILEI post la Jubilea Jaro" — raportis pri la ĵus okazinta 21-a Konferenco en Lodzo kaj sub la gvidado de Zsuzsa BARCSAY, la multnombra geinstruistaro aŭdis novaĵojn pri kelkaj pedagogiaj realigoj kaj projektoj en diversaj landoj kaj kontinentoj el la buŝo de: Hans BAKKER (Afriko), Graham LEON-SMITH (Britio), Lian ZIMING (Ĉinio), Gábor TIMÁR (Hungario), Claude NOURMONT (Francio), Elisabeth FORMAGGIO (Italio), kaj So Gil SU (Koreujo). Plie, Irena SZANSER raportis pri la okazontaj ekzamenoj dumkongresaj, la 31-an de julio; R. LLORENS pri la Koresponda Servo Mondskala; Mila VAN DER HORST-KALINSKA pri la Cseh-aranĝoj; István ERTL pri la Internacia Pedagogia Revuo (IPR), kaj Zsuzsa BARCSAY mem pri la kvin ĝisnunaj Internaciaj Metodikaj Seminarioj.

Mila VAN DER HORST-KALINSKA anoncis la 22-an ILEI-Konferencon en Nederlando de la 16-a ĝis la 23-a de julio 1988, kaj Arnold PITT anoncis la 23-an Konferencon en Britio, verŝajne en Kimrujo, *post* la UK en Brighton.

Post ronddemando ĉe la publiko, la vicprezidanto de ILEI prononcis kelkajn konkludajn vortojn kaj anoncis la kadrotemon de la venonta "Tago de la Lernejo" en Roterdamo (1988).

INTERNACIA EKZAMENO

Surbaze de la antaŭa regularo de UEA, Irena ZSANSER, nome de ILEI, kun la aktiva helpo de Zsuzsa BARCSAY, organizis Internacian Lingvoekzamenon. Dekok afrikanoj, kiuj ĉeestis la UK, sukcese trapasis la ekzamenon kaj ricevis diplomon.

Leterkesto

"Nu, kiam venas la ILEI-revuo, mi trafoliumas por vidi ĉu ĝi enhavas ion, kio helpos min pli bone instrui. Honeste, plej ofte mi trovas la artikolojn tro esoteraj. Se mi devas legi la saman alineon tri-, kvarfoje, mi malpaciencas. Tio ne estas kritiko pri via altnivela revuo, nur konfeso pri miaj propraj bezonoj. Miaj bezonoj kiel Esperanto-instruistino estas: luksaj, plenkoloraj grafikaĵoj, bildoj, fotografaĵoj, filmoj ktp. ktp. Esperantaj.

Vera PAYNE, Aŭstralio"

* * *

Lingvistiko

INTERNACIISMOJ: ĈU HELPO, BARO AŬ REZERVA FONTO EN LERNADO DE ESPERANTO?

T. Dahlenburg

Ne malofte en varbfolioj, lernolibroj kaj eĉ televidelsendoj oni intencas interesigi homojn pri Esperanto, argumentante ke ĝi estas facile lernebla lingvo kaj ke ĝia gramatiko ampleksas nur 16 regulojn.

Proporcie multfoje okazas ke, allogitaj per tia trompa varbado, lernantoj post kelka tempo seniluziiĝas, kompreninte, ke sen konstanta ĉiutaga ekzercado ankaŭ Esperanto ne estas regebla.

En *Scienca Revuo* (vol. 33/1982, n-ro 1, p. 5-10) d-ro D.B. GREGOR publikigis artikolon sub la titolo "Kiom da reguloj vere havas Esperanton?", kiu trafas la kernon de mia pripensado. Li skribis interalie:

> Komencante ĉi tiun studon, mi intencis sciigi al la esperantistaro la efektivan sumon da reguloj, sed mi rezignis. Ĉu oni iam sumigis la regulojn de la franca lingvo? Sufiĉu, ke ili estas multe pli ol 16, sed ke ni ĉiam povas fiere proklami, ke Esperanto havas malpli multe da reguloj (t.e. memorendaĵoj), ol aliaj lingvoj.

En tiuj vortoj troviĝas la reala elirpunkto por serioza esperantistigo!

Nia internacia lingvo estas internacia prefere laŭ sia destino: funkcii kiel komprenigilo inter homoj de plej diversaj kulturoj. Laŭ sia konsisto — vortprovizo, gramatika strukturo, sintakso, prononco, skribregularo — ĝi postulas de interesatoj specifajn lernstrategiojn depende de ilia etnolingva aparteneco kaj de ilia ĝenerala klereco. La lasta inkluzivas ankaŭ la ĝeneralan kaj specifan prilingvan scion, t.e. la scion koncerne la sistemon aŭ nesistemecon de la gepatra lingvo, ĉar la lernado de Esperanto plejparte okazas surbaze de jam alproprigita etna lingvo.

La lernanto de Esperanto estu informita pri la plej gravaj donitaĵoj almenaŭ de sia gepatra lingvo (enkadre de la lernejaj programoj). Kondiĉe ke la gepatra lingvo de E-lernanto estas inklina al transpreno de internaciismoj, li posedu kiel eble plej grandan stokon da ili, *ĉar en Esperanto internaciaj, latin- kaj grekdevenaj radikoj (radikaloj) ludas decidan rolon en la sukcesplena lernprocezo.*

Mi nun koncentriĝu al germanlingvano, kiu decidis okupiĝi pri Esperanto, kaj kiu estas sufiĉe kapabla por lingvaj komparoj, analizoj, konkludoj:

Laŭ la ĝenerala regulo n-ro 15 "la tiel nomataj vortoj 'fremdaj', t.e. tiuj, kiujn la plimulto de la lingvoj prenis el unu fonto, estas uzataj en la lingvo internacia sen ŝanĝo, ricevante nur la ortografion de tiu ĉi lingvo ..."

Flankenlasante la ortografiajn ŝanĝojn, al kiuj internaciaj vortoj devas submetiĝi por esti akceptataj kiel veraj esperantaĵoj (ekz. evito de duoblaj konsonantoj en la radiko: germ. *akkumulieren* → esp. *akumuli*), ni devas konstati, ke en Esperanto svarmas internaciaj vortoj, kies eksteraĵo estas ŝanĝita tute kontraŭ la menciita regulo (ekz. germ. *Rubin* → esp. *rubeno*; germ. *Pendel* → esp. *pendolo*).

Krome ni trovas internaciajn vortojn, kiuj havas alian enhavon ol la responda vorto en la germana lingvo (ekz. germ. *Konkurs* → "bankroto", sed ne "konkurso"). Ekzistas ankaŭ vortoj internaciaj en Esperanto, kiuj estas skribataj ne laŭ la prononco en la fonta lingvo, sed laŭ la ortografio en la fonta lingvo (ekz. esp. *ensemblo* → franc. *ensemble*), dum aliaj spegulas la prononcon, sed ne la ortografion en la fonta lingvo (ekz. esp. *ĵurnalo* ← franc. *journal*).

Por homoj, kiuj jam okupiĝis pri fremdaj lingvoj, la rememoro pri la ĝusta signifo de iu fremda vorto en Esperanto povas interplektiĝi kun spertoj en alia lingvo, ĉar aŭ la formo aŭ la signifo de difinitaj internaciaj vortoj nur parte koincidas en Esperanto kaj en iuj aliaj lingvoj (ekz. esp. *prospekto* ← germ. *Prospekt,* sed ne kongrua kun la rusa *prospekt*; esp. *koverto,* sed en aliaj lingvoj diversaj formoj, ekz. germ. *Kuvert*, rus. *konvert*).

Se ni supozu, ke nia lernanto de Esperanto jam havas antaŭscion en la latina lingvo, kio ja ĝenerale estas tre favora al alproprigo de Esperanto, ni tamen devas konstati malavantaĝon rilate la pritrakton de samspecaj latindevenaj radikoj (radikaloj) en Esperanto.

Ni komparu tri grupojn de ili, menciante la nuna formon en la germana lingvo kaj en Esperanto, kaj indikante la unuopajn elirformojn en la latina lingvo:

Diversmaniera pritrakto de samspecaj latindevenaj vortoj en Esperanto

FREMDA VORTO EN LA GERMANA	FREMDA VORTO EN ESPERANTO	NOMINATIVO KAJ GENITIVO EN LA LATINA LINGVO
Ulkus *Genus*	*ulcero* *genro*	*ulcus, ulceris* *genus, generis* Ambaŭ vortoj havas radikalon kun *-er*
Mandibel *Matrikel*	*mandiblo* *matrikulo*	*mandibula* *matricula* Ambaŭ vortoj havas en la latina radikalon kun *-ul-*
Artikel *Ventrikel*	*artikolo* *artiklo* *ventriklo*	*articulus* *ventriculus* Ambaŭ vortoj havas en la latina radikalon kun *-ul*

Evidentiĝas, ke ne ekzistas ĝenerala unueca regulo koncerne la pritrakton de kompareblaj fontovortoj en la latina lingvo, ĉar verŝajne ne ĉiam la latina lingvo estis prenita rekte kiel fonta lingvo. Do, la fundamenta kono de la latina povas misgvidi la lernanton, kiu ja grandparte jam alkutimiĝis al analogiado en la Esperanto-okupiĝo.

Sed oni povus fari optimisman konkludon: Se ekzistas *ulcero* kaj *genro,* tiam povus ekaperi kun iomete alia enhavo *ulko* kaj *genero,*

mandibulo kaj *matriklo, ventrikolo* ktp. La tendenco al ekapero de tiaj formoj jam manifestiĝas en Esperanto, ekz. en *genero, generi, generado.*

Oni povus kunmeti longan liston de t.n. falsaj amikoj, kiuj ekzistas en Esperanto kaj kiuj komplikigas la lernprocezon depende de la gepatra lingvo de la lernanto aŭ de liaj ĝeneralaj fremdlingvaj konoj. Sed tiu cirkonstanco tute ne estas embaraso por la lernado de Esperanto. Kontraŭe: ĉar en Esperanto en minimigita kvanto estas modelataj gravaj evolutendencoj de etnaj lingvoj, ĝi eksplicite taŭgas kiel propedeŭtikilo al vere konscia kompreno de lingvo-sociaj procedoj.

Pli supre mi aludis kelkajn vortprovizajn rezervojn en Esperanto, okupiĝinte pri la sorto de radikaloj kompare al la latina paralelvorto.

Nun ni supozu, ke nia Esperanto-lernanto tre atente observas la aplikon de latindevenaj vortoj en la germana, kiuj estas uzataj en du diversradikalaj variantoj, depende de la bezonata vortkategorio, ĉu verbo, ĉu substantivo. Se li bone memoras la latinajn radikalojn por formi la prezencon de la aktivo kaj la participon de la pasiva preterito, la ŝajna malreguleco en la germana lingvo ne liveras al li malfacilaĵojn: *kondolieren* (infinitivo), *die Kondolenz* (substantivo) / *kollidieren* (infinitivo), *die Kollision* (substantivo) / *korrodieren* (infinitivo), *die Korrosion* (substantivo). Li verŝajne nur kapskuante konstatas nuntempan intermikson de similaj formoj, ekz. *rezipieren* kaj *rezeptieren* (kiel infinitivoj) kaj *Rezept* kaj *Rezeption* (kiel substantivoj) / aŭ *adaptieren* (kiel infinitivo) kaj *Adaptation* aŭ *Adaption* (kiel substantivoj).

Sed en tiu konstato, rilate al fenomenoj en la gepatra lingvo, jam kuŝas estonta sperto koncerne la internacian lingvon Esperanto. Ni nun komparu la supre menciitaj fremdajn vortojn en la germana lingvo kun ilia ekvivalento en Esperanto, kaj vi vidos, ke la problemoj nur supraĵe estas solvitaj; ĝenerala 'recepto' mankas malgraŭ la ekzisto de la regulo 15.

La radikaloj de internaciismoj en la germana lingvo kaj en Esperanto

	VORTKATEGORIO	GERMANE	ESPERANTE
I	verbo	*kondolieren*	*kondolenci*
	substantivo	*Kondolenz*	*kondolenco*
	verbo	*kollidieren*	*kolizii*
	substantivo	*Kollision*	*kolizio*
II	verbo	*korrodieren*	*korodi*
	substantivo	*Korrosion*	*korodo*
	verbo	*korrespondieren*	*korespondi*
	substantivo	*Korrespondenz*	*korespondo*

En la parto I de nia tabelo la esperantlingva radiko kongruas kun la germanlingva substantiva radikalo, kaj la esperantlingva substantivo (laŭ germanlingva vidpunkto) liveras la bazon por formi la konvenan verbon (*kondolenci, kolizii*).

En la parto II, inverse, la esperantlingva radiko kongruas kun la germanlingva verba radikalo, kaj la esperantlingva verbo liveras la bazon por formi la konvenan substantivon (*korodo, korespondo*).

Evidentiĝas, ke multaj eblecoj de formado de fremdaj vortoj en Esperanto (laŭ la vortuzo en la citita regulo 15) ankoraŭ ne estas malkovritaj, ĉar ja estus tute neriproĉeblaj formoj kiel *korozio-korozii, korespondenco-korespondenci, kolodi-kolodo, kondoli-kondolo.*

Ĉu vi protestas kontraŭ tiu fantoma konkludo?

Ne faru tion; observu nian internacian lingvon, ĉar jam ekaperis eroj de tiu tendenco. Kelkaj ekzemploj konvinku vin pri tio:

En la germana lingvo ekzistas la verbo *resignieren* kaj la substantivo *Resignation* — en Esperanto en la sama senco uzatas *rezignacio-rezignacii,* sed en alia senco oni trovas la verbon *rezigni* (komparu la germanan verbon *resignieren*).

Aliaj ekzemploj estu donitaj tabelforme:

GERMANLINGVAJ RADIKALOJ	ESPERANTLINGVAJ PARALELOJ
Konzeption → *konzipieren*	*koncepto, koncepti* *koncipi*
Publikation → *publizieren*	*publikigi, publikigo* *publici*
Konzession → *konzedieren*	*koncesio, koncesii* *koncedo, koncedi*
Konvention → *konvenieren*	*konvencio* *konveni, konveneco*

En multaj aliaj kazoj mankas al ni formoj, kiuj prenis kiel bazon la alian, ankoraŭ 'liberan' radikalon, ekzemple ĝis nun ne ekzistas formoj kiel *infici, konspiracio, intervencio,* kvankam ili plenplene kongruus kun la sistemo de la vort- aŭ formfarado en Esperanto. Sed tiaj formoj atendas, ĝis kiam la parolantoj bezonos ilin, kaj tiam la lernado de internaciismoj fariĝos pli sencoplena ol hodiaŭ.

Ni ne strebu al senkompromisa ŝanĝo de nia valorega lingva interkomunikilo; ni serĉu rezervojn por ebligi al Esperanto kreskantan aplik-taŭgecon.

Friedrich Melchior VON GRIMM [fridriħ melħior fon grim] formulis la sintenon, deziratan de homoj al sia lingvo, jene:

> "Genia homo ne alcelas ŝanĝon de sia lingvo, tio ja estus sensencaĵo. Sed li trovas forton transbatali la barojn, kiujn ĝi kontraŭmetas al li."
> *Der geniale Mensch zielt nicht darauf ab, seine Sprache zu verändern; das wäre Unfug. Er versteht es aber, sich durch die Hindernisse hindurchzukämpfen, die sie ihm entgegenstellt.*

(Mallongigita prelego, farita en la filologi-scienca fakultato de la Universitato Eötvös Loránd, 12 nov. 1987).

Instrupraktiko

LINGVOINSTRUADO PER BILDOJ

Johan Hammond ROSBACH

Kiam, en 1950, mi faris mian ekzamenon ĉe la Ŝtata Pedagogia Seminario, mi renkontis kritikon pro uzo de bildoj. Mi malakceptis la kritikon, kaj poste, dum baldaŭ kvardek jaroj, uzadis bildojn, tre diversajn kaj en tre diversaj manieroj, ĉiam kun bona rezulto.

Dum la studjaro la kandidatoj devis aktive instrui klasojn ĉe gimnazio pri ĉiuj siaj fakoj. Por mi tio signifis, ke mi instruu la latinan, la francan kaj la germanan lingvojn. Mia instrulernejo estis la Katedrala Lernejo en Oslo, kie ĝuste tiam nia nuna kronprinco lernis, do tre grava lernejo. Dum la lasta parto de la studsezono, la rektoro de la Pedagogia Seminario faris subitan viziton en la klaso, kune kun la ordinara lektoro de la klaso. Tia vizito okazis regule en du el la tri fakoj instruataj, kaj laŭ la impreso tiam ricevita la rektoro, kunlabore kun la gvidlektoro, do la ordinara klaslektoro, decidis la tre gravan noton pri "praktika instrukapablo". Sen plej bona noto en tiu branĉo oni povus tuj rezigni pri lektora posteno.

Nu, mi estis tre bonŝanca. Tion mi almenaŭ supozis. Ĉar ĝuste por la leciono, kiam la rektoro enpaŝis, mi preparis eksterordinaran aferon. La fako estis germana lingvo por komencantoj. La teksto temis pri infano malsana, kiu ricevis viziton de la kuracisto. La kuracisto preskribis medikamenton kontraŭ la terura tuso de la infano. Mi trovis, sur la frontpaĝo de iu semajna gazeto, grandan koloran desegnaĵon de Lawson WOOD, kiu estis tiutempe tre populara. La bildo montris simiidon, kiu kuŝas enlite, kaj kuraciston, ankaŭ simion, kiu apudas kun kulero da kontraŭtusa siropo.

La lernantoj estis feliĉaj pro la bildo, kiu rompis la enuon de la senilustraĵa lernolibro, kaj kiu alportis iomete da gajeco bonvena en la cetere monotona lerneja tago. Ili respondis per aktiva partoprenado en la tre elementa konversacio, kaj mi estis feliĉa, ke la grava rektora vizito okazas ĝuste en tiu leciono!

Sed post la leciono, kiam ni triope diskutis mian lecionon, la rektoro unue tre laŭdinte mian katedran sintenon kaj ceteran instruadon, forte kritikis mian uzon de la menciita bildo. La bildo ja ne ilustris la tekston, ĉar en la teksto ne aperis simioj! Mi povis apenaŭ kredi miajn orelojn, kiam li diris tion. Mi respondis, ke la lernantoj ĝuste per tio lernis ankaŭ la germanan vorton, kiu signifas "simio", kaj ke ili tamen tre fervore reagis ĝuste al mia uzo de tiu bildo. Mi nun timis, ke mia noto pri praktika instrukapablo estas jam en la mondo de la revoj, ĉar la rektoro volis neniel samopinii kun mi.

Nu, mi tamen ricevis la deziritan noton, sed mi ĝis la hodiaŭa tago ne povas samopinii pri la netaŭgeco de tiu bildo en tiu situacio. Kaj mi daŭrigas mian uzadon de bildoj. Mi ne volas ĉi tie doni liston pri la diversaj bildotipoj, nek pri la diversaj uzmanieroj dum la jaroj, kiuj pasis post 1950. Mi limigos min al la prezento de unusola programo, kiun mi ekuzis — bedaŭrinde — nur antaŭ ses jaroj.

En mia granda kolekto de diapozitivoj faritaj dum eksterlandaj vojaĝoj kaj dum montaraj migradoj en nia lando, mi havas, kompreneble, multajn seriojn. Mi elektis, la unuan fojon, relative mallongan serion, ĉar la eksperimento estis ja nova. La serio enhavis bildojn pri tiom diversaj aferoj kiel koleoptero, arbostumpo, palaco, leono, glaciejo, vendoplaco ktp.

La unuan fojon mi montris dek bildojn, kiujn mi detale komentis, enkondukante la lernotajn vortojn kaj esprimojn, kaj dum la komentado faris demandojn al la lernantoj, tiel ke la tuta leciono pleniĝis per la konversacio pri tiuj dek bildoj. Ĉar la klasejo ja estis malluma dum tiu leciono, estis neeble ion skribi. Por la sekvanta leciono mi do estis preparinta tajpitan liston pri la vortoj kaj esprimoj lernendaj.

En la posta semajno la dek jam prezentitaj bildoj revenis sur la ekranon, kaj tiam la lernantoj mem devis komenti, uzante siajn jus lernitajn novajn vortojn. Tiu parto de la leciono do servis du celojn: lingvan ekzercadon kaj kontroladon de la studoj. Poste sekvis dek novaj diapozitivoj, kun novaj temoj, sed ankaŭ kun ripeto de la jam komentitaj.

Sed tio ne sufiĉis. Du semajnojn post la prezentado de deko da bildoj, ĝuste la vortoj kaj esprimoj el tiu serio estis la temo por skriba tasko en la klasejo. Mi devas nur konfesi al mi mem, ke mi povis ĉiam esti tre kontenta pri la fervoro de la gimnazianoj kaj pri la fina rezulto.

Por ke la klaso, fine, spertu ke oni vere ion lernis, ni invitis ĉe la fino de la diapozitiva serio la rektoron de la lernejo kaj alian klason samnivelan al prezentado de la tuta serio. Kaj tiu prezentado daŭris dum du tutaj lecionoj. La lernantoj mem nun komentis la bildojn. Por ke niaj gastoj ne pensu, ke tiu lernanto lernis pri tiu bildo, do ke ili estas specialistoj pri kelkaj bildoj, ni invitis la gastojn mem elekti, kiu lernanto komentu kiun bildon. La afero estis grandega sukceso, kaj ĉe la fina ekzameno la tuta klaso atingis brilajn notojn.

Mi aldonu, ke la eksperimenton mi uzis nur en instruado de la franca kaj de la germana lingvoj, sed ĝi certe same bone funkcius ankaŭ por la angla, la itala, la hispana, la rusa, kaj por Esperanto.

La ideo estas senpaga...

Paroligi per rol-ludoj

de Stefan MacGill, Hungario

Dua parto de du-parta artikolo pri la uzo de dramo en la instruado.

En la lasta numero de IPR ni esploris la uzon de didaktike verkitaj teatraĵoj. Ĉifoje ni paŝas laŭminace pluen al rol-ludoj, t.e. spontanea senteksta aktorado. Ĉi tio estas ekzercoformo grandskale kaj sukcese uzata en nacilingva instruado, sed kiujn esperantaj instruistoj apenaŭ ekspluatis. Temas pri aktiva kaj komunika uzo de la lingvo. Antaŭ ol prezenti detale la teknikon, ni demandu, kial aparte gravas evoluigi la parol-kapablon en Esperanto. La uzo de internacia lingvo diferencas fundamente disde tiu de etnaj lingvoj kelkmaniere:

- Esperanto estas malpli intense uzata ol preskaŭ ĉiuj etnaj lingvoj.
- La skriba-lega uzo de Esperanto superas la parolan-aŭskultan uzon pli ol okazas ĉe etnaj lingvoj.
- Ĉar la parola uzo okazas ĉefe en kongresoj kaj renkontiĝoj, la proporcio de formala unu-direkta parola lingvaĵo kompare al neformala kaj du-direkte konversacia estas pli alta ol en etnaj lingvoj.
- Samkiale, la gamo de temoj kaj situacioj en kiuj oni uzas, testas kaj evoluigas la lingvon, estas pli limigita ol etnolingve.
- Etnolingve la parolkapablo kreiĝas nature tra la familio. En Esperanto tio devas esti konscie kreata per instruado. Sekve la lernado okazas en ne plu optimumaj aĝoj, kaj la proporcio de komencantoj en la komunumo pli altas ol ĉe etnaj populacioj.
- Kvankam Esperanto estas internacia lingvo, alta procentaĵo de la renkontiĝoj de esperantistoj estas se ne lokaj, ne pli ol naciaj, tiel ke la kunvenintoj havas komunan etnolingvon por eviti aŭ artefaritigi la uzon de Esperanto.

Ni emas subtaksi ĉi tiujn faktorojn kaj dorloti nin per la asertoj, ke Esperanto estas plurfoje pli simpla ol aliaj lingvoj kaj forgesi aŭ ne konscii pri ĉi tiuj gravaj malhelpoj kontraŭ kiuj ni devas lukti. Ili rilatas aparte al la vivigo de la parola lingvo, kaj el tio fontas la konvinko, ke ni devas kiel eble plej frue kaj insiste en niaj instruprogramoj ekzerci la parol-kapablon kaj -lerton. Tiucele rol-ludoj.

Difino kaj klarigo

Ĉiu rolulo ricevas skribitajn instrukciojn pri iu decidita situacio kaj pri la propra rolo ene de tiu situacio. Gravas, ke ĉiu rolulo ricevu nur la proprajn instrukciojn, kaj ne scias tiujn, kiujn ricevos la aliaj. Rolulo devos malkovri la dezirojn aŭ celojn

de la aliaj dum la dialogado kaj devas esti sufiĉe lerta por kompreni la disvolviĝantan situacion, taŭge reagi por plenumi la propran rolon kaj tiel pluevoluigi la tuton.

Sed simplaj rolludoj, kiel niaj du komencaj ekzemploj, povas havi nur malmultajn rolulojn – de 2 ĝis 5. Plejofte niaj klasoj estas pli grandaj. Kion fari? Se estas tri roloj, dividu la klason en tri. Ĉiu grupo studos la instrukciojn por unu rolo. Antaŭ la ludado la klasanoj legu la instrukciojn en la grupoj, komprenu, interpretu kaj diskutu ilin kaj listigu bone uzeblajn vortojn, frazojn kaj esprimojn. La gvidanto uzu tiun tempon por cirkuli inter la grupoj por kontroli, ĉu la instrukcioj estis bone kaj sufiĉe komprenataj, por respondi demandojn kaj proponi pliajn ideojn. Poste la gvidanto elektu unu "volontulon" el ĉiu grupo, kiuj aktoru la situacion. Post la prezentaĵo la gvidanto povas laŭdi inventemon kaj lertan lingvo-uzon, atentigi pri la ĉefaj lingvaj eraroj kaj inviti komentojn de la grupanoj, antaŭ ol elekti tri pliajn "viktimojn" kaj ripeti la rol-ludon. Ne timu, kvankam ili espereble profitos de la unua ludado kaj de ĝia pritakso kaj komentado, la sekvantoj certe prezentos malsaman interpreton de la sama situacio. Estas dezirinde ripeti la roladon ĝis ĉiu kursano povis (aŭ devis!) roli.

Elementa nivelo

Rol-ludojn oni povas enkonduki eĉ frue en la kurso, eble post 15 horoj da instruado. Pli frue kaj prepare oni povas studi kaj aktori simplajn dialogojn, ekz. pri manĝotablumado: "Bonvolu doni la salon" aŭ aĉetado: "Kiom kostas tiuj bananoj?". Post kelkfoja aktorado laŭ donita teksto lernantoj povos mem sentekste krei proprajn scenetojn en tiuj konataj situacioj, per la jam prezentitaj frazformoj. Poŝt kvin ĝis dek el tiuj scenetoj (kies daŭro estu apenaŭ po tri minutoj) kaj internigo de la necesa gramatiko kaj vortaro, oni povas progresi al vera elementa rol-ludo. Ekzemplon de tia plej elementa rol-ludo mi provos ŝovi en numeron 88/2 de la lerneja revuo *Juna amiko*. Nia nuna ekzemplo de simpla rol-ludo titoliĝas "La ferioj" kaj aperis en *JA* numero 87/3 sur paĝoj 5, 14 kaj 23. Ĝi taŭgas ekde ĉ. 25 stud-horoj. Temas pri du amikoj, kiuj devas decidi, kie pasigi feriojn. Unu volas viglajn sportajn feriojn, la alia trankvilajn kaj ripozigajn. La tria rolulo estas vojaĝ-agento, kiun la amikoj vizitas por konsilo. Sed la agento devas nepre (pro kialo, kiun ni preferas ne malkaŝi) konvinki la duopon akcepti difinitan pakaĵferion, pri kiu li ricevas detalan priskribon. Li devas transformi tiun sekan faktaron en konvinkajn frazojn, dum la du amikoj devas argumenti kaj persvadi unu la alian. Suplementis la instrukciojn por la tri roluloj konsiloj por la gvidanto de la ludo. Do, se vi ankoraŭ ne abonis *Juna amiko*, vidu la apudan anoncon kaj tion ekfaru por konatiĝi interalie kun ĉi tiuj simplaj rol-ludoj.

Meznivela rolludo

Laŭ la devizo, ke unu bildo valoras mil vortojn, ni prezentas ne bildon, sed praktikan ekzemplon (kiu valoras supozeble ĉirkaŭ 700 vortojn, depende de la aktuala kurzo inter la bildo kaj la ekzemplo). Ĝi estis verkita por progresantoj, kaj efek-

tive estis prezentita unuafoje de kvar studentoj de la Esperanto-fako de la Universitato Eötvös Lóránd en Budapeŝto. Ili ĝin faris, sen antaŭa preparado, por spektantaro, kiu konsistis el unu vidbenda kamerao kaj teknikisto. Tio okazis kadre de projekto de la hungara sekcio de ILEI registri serion de model-lecionoj diverstemaj kaj -nivelaj. Se statika bildo valoras mil vortojn, dinamika vidbendo devas valori almenaŭ du mil! Do, atendu anoncojn kiel akiri kopiojn de tiu vidbendo kaj ĝin spektu. Tio gravas ĉi-kaze, ĉar por plene kompreni la rol-ludon, necesas legi la donitajn rolojn ĉi-apude, legi ĉi tiun klarigan artikolon kaj vere spekti grupon, kiu plenumas ĝin. Kompreneble, se vi mem gvidas taŭgan grupon, vi povas retajpi la instrukciarojn kaj elprovi ĝin mem. Antaŭ ol plulegi la artikolon, bonvolu nun legi la enkestajn instrukciojn por la kvar roluloj.

ROLO A:
Vi troviĝas en fremda urbo. Vi eniras tramon por vojaĝi al la centro, kaj vi serĉas gastejon – modestan hotelon aŭ eĉ junulargastejon. Amiko konsilis bonan gastejon: "Amikeco". Vi demandas vian najbaron en la tramo kie troviĝas tiu gastejo. Vi havas kun vi pezan dorsosakon. Vi volas pagi por la tranokto ne pli ol 70 stelojn, se eble malpli. Vi tre malŝatas ovojn, vi iĝas malsana, se vi manĝas ilin. Vi rifuzas trinki kafon, ĝi estas drogo kaj vi abomenas drogojn. Vi estas vegetarano.

Se vi ne ricevos kontentigan respondon de la apudaj pasaĝeroj, povos esti, ke poste eniros la tramon alia pasaĝero kun gvidlibro, kiu povos doni pli fidindajn informojn. Matene vi foriros de la ĉefa stacidomo frue per trajno je la sepa tridek.

Ĝis la fino de la ludo vi devas decidi, kie vi tranoktos.

ROLO B:
Vi estas pasaĝero en tramo. Eksterlandano venas en la tramon kaj demandas vin aŭ alian pasaĝeron, kie troviĝas la gastejo "Amikeco". Vi scias. Se la eksterlandano petos vin, informu ŝlin. Se ŝli petas iun alian, aŭskultu la respondon kaj se necese korektu la informojn.

"Amikeco" estas mez-luksa hoteleto en la norda parto de la urbo. Ĝi estas atingebla de la centro per tramo 27 (3 haltoj). Malantaŭ la hotelo estas ĉarma parko kun belega lageto kun anasoj kaj cignoj. Antaŭ ĝi staras iu stacidomo, sed la bruo ne estas tro granda. La tramhaltejo troviĝas tuj antaŭ la hotela pordo. Ĝi estas familia hoteleto, la estroj estas afablaj kaj la servo bona. Oni servas grandan matenmanĝon – ovojn kun lardo kaj toasto kaj kafon.

Eble iu konsilos uzon de la junulargastejo: tio estas malbona ideo, ĝi havas malbonan reputacion. Ĝi estas longe for en la sudo de la urbo, malfacile atingebla, oni devas ŝanĝi veturilon kaj promeni duonan kilometron. Krome dormas 16 personoj en ĉambro, ĝi estas malpura kun bestetoj ĉe la muroj kaj vi aŭdis, ke droguloj emas dormi tie kaj fumi haŝiŝon. Via tasko estas konvinki la eksterlandanon uzi la hoteleton kaj ne la junulargastejon.

ROLO C:
Vi estas pasaĝero en tramo. Eksterlandano venas en la tramon kaj demandas vin aŭ alian pasaĝeron, kie troviĝas la gastejo "Amikeco". Vi scias. Se la eksterlandano petos vin, informu ŝlin. Se ŝli petas iun alian, aŭskultu la respondon kaj se necese korektu la informojn.

"Amikeco" estas la nomo de la junulara gastejo en via urbo. Ĝi troviĝas en la sudo, oni iras per tramo 12, poste ĉe la Stadiono oni ŝanĝas al buso 36, kaj post ses haltoj oni devas promeni 200 metrojn. La gastejo proponas simplan sed adekvatan loĝigon – 8 personoj en ĉambro. Ĝi estas sufiĉe pura, apude estas sportejo, kaj vespere inter la junuloj regas tre gaja vigla etoso. Vi kelkfoje vizitis ĝin. Matenmanĝo konsistas el teo kaj bulko. Eble oni ekparolos pri iu hotelo "Amikeco". Tion vi ankaŭ konas. Ĝi estas tro multekosta, almenaŭ cent stelojn nokte, dum la junulargastejo kostas nur kelkajn. La hotelo ne estas tre bona kaj tute nealoga por junulo, gastas tie nur maljunuloj. Ĝi estas tuj apud la ĉefstacidomo, ĉiam bruas trajnoj. La trafiko tie estas densa kun tramoj kaj kamionbruo la tutan nokton. Malantaŭ la hotelo troviĝas iu malprizorgita tereno kun koto kaj iom da herbaĉoj, kie la urbanoj ĵetas sian rubon. Iam ĝi estis parko, ŝajne. La familio, kiu estras la hotelon malbone akordiĝas – via najbaro informis vin – kaj foje ili kverelas laŭte laŭ la koridoroj. Via tasko estas konvinki la eksterlandanon uzi la junularan gastejon kaj ne la hoteleton.

ROLO D:
Vi envenas en tramon meze de la ludo. La gvidanto signos al vi kiam. Vi tenas gvidlibron pri la urbo. En la tramo oni diskutas pri iu gastejo "Amikeco", sed ne estas certe, kie ĝi troviĝas: iu eksterlandano kun dorsosako volas trovi ĝin. Eble oni petos vin doni informojn el via gvidlibro. Se ne, vi mem proponu al ili la informojn. Jen la teksto en la libro:

- "Amikeco": C-kategoria hoteleto, Stacidomostrato 17, tramo 27. 20 ĉambroj, el kiuj 10 kun banĉambro kaj necesejo. Kelkaj ĉambroj kun balkono kaj elrigardo al parko. Tranokto kaj abunda matenmanĝo: 75 ĝis 90 steloj. Prizorgantoj: Gesroj Luk kaj Reba Temul.
- "Amikeco": Junular-gastejo, Lontanostrato 342, tramo 12 ĝis la hospitalo, poste buso 35, poste promenu 400 metrojn. 10 ĉambroj, ĉiuj kun 12 litoj. Komunaj duŝejoj, necesejoj kaj kuirejoj. Sportejo apude. Lum-elŝalto de 22.00h ĝis 07.00h. Tranokto kun matenmanĝo: 16 stelojn.

Bonvenon denove! Notu la klaran konflikton en la ludo – la eksterlandano devas elekti el du eblecoj, depende ĉu rolulo B ĉu C pli konvinke argumentas. Rimarku kiel ili havas kontraŭajn opiniojn pri pluraj aferoj: en la junulara gastejo laŭ C "regas tre gaja vigla etoso" dum laŭ B "droguloj emas dormi tie kaj fumi haŝiŝon." Krome A estas taskita abomeni drogojn, se eĉ kafo ŝokas, tiom pli haŝiŝo

malakcepteblos. Simile pri la hotelo, ĉu apudas ĉarma parko kun lageto, cignoj kaj anasoj, aŭ rubejtereno? Eĉ ĉe detaloj persistas la kontraŭdiroj. Konsideru la matenmanĝon – la minimuma junulargasteja teo kun bulkoj – tion normale devus konkeri la abunda lardo kun ovoj, toasto kaj kafo ĉe la hotelo, kiun rolulo B povos fiere kaj konvinke proponi, nesciante, ke la eksterlandano rifuzos la kafon, malŝategas ovojn kaj estas vegetarano. Regas konfuzo pri la nombro de dormantoj en junulargasteja dormĉambro (16 laŭ B, 8 laŭ C kaj 12 laŭ D) kaj pri la promenenda distanco (duonan kilometron, 200 m., 400 m. resp.). Hotelapude staras laŭ B "iu stacidomo" sed laŭ C "la ĉefstacidomo". Rimarku, ke nur A scias, ke ŝli devas foriri de tiu ĉefa stacidomo je la sepa tridek, kaj ke laŭ C neeblas forlasi la junulargastejon antaŭ la sepa, kaj kalkuleble estas, ke en duona horo oni ne povas atingi la stacidomon. Tio iĝos potenca argumento por B, sed nur potenciale, nur se A kaj C ambaŭ ial donos la necesajn informojn. Oni ne atendu, ke en ĉiu rolludo ĉiuj el la donitaj argumentoj kaj konfliktiloj estu ekspluatitaj; la roluloj elektos el la abundo, kaj eĉ kelkfoje aldonos proprajn opiniojn aŭ argumentojn.

Gvidanto devas saĝe juĝi kiugrade kaj kiel interveni. Ĉi-kaze ŝli havas unu klaran interveneblon, t.e. kiam doni la signon ke la tramo haltu por enlasi rolulon D kun la gvidlibro. Tiun momenton oni elektu kiam la diskuto ekflagras aŭ devojiĝas neproduktive. Simile, la gvidanto difinas la daŭron de la ludo kaj laŭ la samaj kriterioj elektas la momenton anonci: "restas nur du minutoj ĝis la fino!" La gvidanto povas krome per sugestoj influi, ekz.: "A, eble demandu pri ...la prizorgantoj de la hotelo ...la matenmanĝoj ...la prezoj."

Kiel dirite, la ĉefcelo estas stimuli la parolkapablon en reala situacio. Restas ene de tio decidi kio pli gravas – la kapablo precize interpreti la donitan taskon kaj ĝin zorge plenumi utiligante ĉiujn donitajn informojn, aŭ simple la kapablo libere (sed iom korekte) esprimi sin, uzanta la donitan taskon kiel elirpunkton. Depende kiu el tiuj emfazoj pli gravas, la gvidanto pli aŭ malpli intervenos. Strange, en la pli fruaj utiligoj de rolludoj oni povas argumenti por minimuma intervenado. Komence la rolludo povas signife helpi lernantojn transpaŝi tiun grandan psikologian baron, tiun momenton kiam ili kuraĝas ekparoli en la nova lingvo. Tiam la intervenado estu minimuma – nur por rekomenci la dialogadon se ĝi entute haltis. Ajn-nivele mi ne emas interveni por korekti erarojn, sed notas ilin por tujposta trakto. Komenc-nivele, mi krome emas minimume interveni por redirekti la diskuton, eĉ se ĝi ŝajne misiras, kondiĉe, ke ĝi pluiras. Indas pacienci tra malfacilaj momentoj – kutime post mallonga tempo iu rolulo trovas pli sukcesan pluiron.

Nur kiam lernantoj atingis la kapablon libere kaj flekseble babili kaj ne esti konfuzita aŭ timigita per interrompo, mi emas interveni por insisti pri preciza plenumo de la donitaj roloj – kaj tiukaze nur se estis klare dirite komence, ke tio estas la ĉefa celo de tiu leciono.

Supernivela rolludo

Ĉi tio povas postuli pli da roluloj kaj krome havi pli seriozan temon – eĉ kulturan, sociologian aŭ etikan. Por ebligi pli ol kvin/ses roluloj la situacio kutime

devas esti iu formala aŭ planita kunveno. En la nuna kazo mi ne detale skizos la instrukciojn. Unue, tio okupos tro da loko, due ĉar ĉi tiaj situacioj estas firme bazitaj en iu nacia kulturo – ĉiulande necesas verki la instrukciojn laŭ la normoj, kutimoj kaj strukturoj de la lerneja, jura kaj sociala sistemoj. Tio ja ne ekskludas la leviĝon de universalaj veroj kaj ideoj dum la ludado! Temas ĉi-ekzemple pri kunveno en lernejo por decidi la sorton de Lara, juna deliktulino, kiu rompis kelkajn fenestrojn kaj ŝtelis radion. Jen koncize la roloj:

Lernejestro: Firma kredanto je disciplino. La instruisto de tiu knabino estas ano de subfosa radikala movado por detrui la bonajn tradiciojn de la eduka sistemo. Vi volonte forigus lin de via lernejo. Apenaŭ kelkaj el la instruistoj subtenas viajn ideojn; feliĉe almenaŭ via lojala sekretario kuraĝigas vin.

Instruisto: Progresiva, demokratema edukisto. Vi provas bonigi la konduton de Lara kaj similajn lernantojn, sed la etoso de la lernejo malhelpas tion. La lernejestro estas aparte konservativa, sed lia insisto pri la tradicia moralo ne konvinkas vin: vi vidis lin la antaŭan semajnon kisadi la sekretarion intime en la multobligejo.

La gepatroj, ges-roj Difor: Ne scias kien iras Lara vespere, kaj ne plu kapablas regi ŝin. Opinias, ke la lernejo devas pli forte disciplini ŝin.

Sociala Laboristo: Lara jam ŝtelis antaŭe el iu butiko. Vi konas ŝin, kaj kredas, ke ŝi bezonas pozitivan hejman etoson. Provu konvinki la gepatrojn pri tio. Vi estas amiko de ŝia instruisto.

Policisto: Vi estas petata raporti la faktojn de la krimo. Vi estis patrolanta kiam vi aŭdis krion. Vi vidis la knabinon Lara kuri for de domo portanta radion. Oni kriis, ke ŝi ŝtelis ĝin. Vi blovis vian fajfilon kaj ekĉasis ŝin. Ŝi kuris tra tomat-ĝardeno kaj rompis plurajn vitrajn kadrojn. Fine, vi kaptis ŝin. Vi havas ĉe vi la radion.

Edzino de la lernej-estro: Ĝuste de via domo Lara rabis la radion. Vi kriis, kaj pasanta policisto aŭdis kaj kaptis ŝin. Via edzo donacis al vi tiun radion antaŭ du semajnoj – surprizo por vi, ĉar li ne estas tre aĉetema.

Sekretario: Vi laboras en la lernejo dum tridek jaroj. Vi admiras la lernejestron. Li bone kaj firme regas la lernejon kaj brave rezistas la incidajn klopodojn de kelkaj junaj instruistoj anarkiigi ĉion. Vi devas raporti pri la lerneja (mal)progreso de Lara. Pretigu anticipe raporton pri ŝi.

Samklasano: Vi estas la plej bona amikino de Lara. Vi ne scias pri ŝia malbona faro, nur ke ŝi ŝtelis ion. Vi ofte ludas kune, unufoje vi prenis kelkajn bombonojn de butiko pro defio, sed vi ĝenerale ne krimas. Kiam oni montras la radion, vi konstatas, ke ĝi estas via! La lernejestro konfiskis ĝin antaŭ du semajnoj, kiam li kaptis vin kaj Lara kune aŭskultantaj ĝin dum teda leciono. Ĝis nun viaj klopodoj reakiri la radion estis sensukcesaj.

Juĝisto: Ĉi tiu loko ne estas kortumo, Lara estas tro juna por kriminala kortumo. Ĉi tiu kunveno estas eksperimenta forumo por arigi ĉiujn koncernatojn pri difinita kazo kaj trovi la faktojn kaj kaŭzojn de la misfarado kaj malhelpi ke Lara poste iĝu ripeta deliktulo. Vi prezidas la kunvenon. Klarigu ĝiajn celojn, petu ĉiun prezenti sin koncize, poste decidu kiu parolos kaj pridemandu ĉiun maksimume. La policisto havas la ŝtelitan objekton. Post aŭskulto de ĉies opinioj, petu,

ke li montru la radion. Fine, vi devos resumi la vidpunktojn kaj decidi pri la puno aŭ reĝustigo aŭ farendaĵo.

Resumo

Se vi jam provis ĉi tiujn teknikojn, aŭ ekprovos ilin laŭ ĉi tiuj proponoj, bonvolu raporti viajn spertojn al IPR. Se vi havas pretajn instrukciojn por rolludoj, bonvolu dividi ilin kun ni. Se vi volas esplori ĉi tiun stimulan lern-art-formon, sciu, ke en la aperonta reeldono de la legolibro "La laŭta vekhorloĝo" de la aŭtoro de ĉi tiu artikolo, vi trovos dekon da freŝe verkitaj rol-ludoj je elementa kaj meza niveloj – ĉiuj rilatantaj al la kvar amuzaj rakontoj en la libro. Konklude, memoru, ke rolludoj povas esti allogaj kaj defiaj. Se viaj lernantoj estas iom kreemaj, kuraĝaj, eksperimentemaj, ili ĝuos rolludi kaj surprizos vin per la kvalito kaj inventemo de ilia partopreno.

Juna Amiko

La gazeto, kiu paroligas

Jen praktika helpilo por ĉiu instruisto de Esperanto. Tutmonda regule aperanta revuo, aparte por lernejanoj. Ŝparu al vi mem tempon en lecion-preparado! ☆ *Juna Amiko* prezentas zorge verkitajn facilajn tekstojn, interes-vekajn kaj didaktike uzeblajn. Fortigu kaj ekzercigu la gramatikaĵojn, kiujn vi instruis per la alloga materialo de *JA*. ☆ Vi trovos rol-ludojn, teatraĵetojn, dialogojn, rakontojn, fabelojn, kantojn, poemojn, konkursojn kun premioj kaj multon pli. Spicu viajn lecionojn kaj paroligu viajn studentojn. ☆ Abonu ĉe UEA: 8,40 gld. por kvar numeroj. Ni donas rabatojn por kvantaj mendoj. Vi rajtas aboni ankoraŭ por 1988; ni tuj sendos la aperintan unuan numeron. Perantoj en multaj landoj akceptos viajn abonojn lokvalute. Petu specimenon de *Juna Amiko*, Hungara Esperanto-Asocio, pf. 193, H-1368 Budapest, Hungario.

PRI INFANLIBROJ EN ESPERANTO

Jacqueline GONIN

Jes, ili ekzistas, kaj ili estas beletaj, allogaj, kaj ĝenerale plenumas la postulojn, kiujn oni atendas de tiu literaturo, kaj mi eĉ estis surprizita pri la kvanto kiun mi malkovris en la daŭro de tiu ĉi studo. Sed ili estas dise eldonitaj, kaj tiu ĉi pritraktaĵo celas konigi ilin al gepatroj kaj pedagogoj. Fakte, s-ro J. CATIL, prezidanto de CERL (Centro Esperanto de la Regiono Liona) petis min iom trarigardi tiujn librojn kaj indiki, por kiuj aĝoj ili taŭgas. Unuavide la demando ŝajnas simpla, sed post pristudo, eble ne tiom...

Se temas pri libro en la gepatra lingvo de la infano, la problemo ne estas tiom malfacila, ĉar la libroj, skribitaj aŭ tradukitaj en la lando mem, respondas al la ĝenerala kulturo de la tieaj infanoj, ties kutimoj, medioj — kampara aŭ urba — ktp.

Kiam temas pri Esperantaj libroj, kiujn kriteriojn oni konsideru? Oni unue pensas pri la lingvo: ĉu la infano estas denaska esperantisto? Tio estas la plej facila, sed la plej malofta kazo. Se ne, se la infano lernas la lingvon, hejme aŭ en kurso, ja apartenas al la instruisto/anto prezenti la enhavon, la nekonatajn vortojn, frazturnojn, aŭ ... rakonti mem la historion en maniero komprenebla por la infano. Sed tio koncernas la pedagogian teknikon kaj uzmanieron de infanlibroj. Pri tio mi ne insistos tie ĉi.

Mi ŝatus iom precizigi la nocion "infanlibro". La temo de tia libro devas interesi, amuzi, se eble instrui, ĉiukaze allogi la etulojn. Libroj *pri* infanoj ne necese estas interesaj *por* infanoj, precipe ne se traktitaj laŭ plenkreskula vidpunkto. Fine, precipe koncerne nian lingvon — kies plimulto de la lernantoj estas ĝis nun plenaĝuloj — "libro por komencantoj" aŭ "facila legolibro" ne nepre taŭgas por infanoj!

Do, mi konsideris la enhavon laŭ la kultura vidpunkto: ĉu la esprimitaj nocioj estas konataj aŭ facile akireblaj de la etuloj? Ĉiuj instruistoj aŭ edukistoj scias ke, eĉ por donita aĝo, la matureco povas esti mal-

sama de unu infano al alia. Do, recenzante libron, prefere ol indiki precizan aĝon, mi menciis nivelon laŭ la lernejaj klasoj de la franca sistemo, kiun mi iom konas. Sed mi petas, ke la leganto nepre ne konsideru tion tro rigide: mi celis nur faciligi la orientiĝon de la gepatroj aŭ pedagogoj. Tial por ĉiu libro mi ankaŭ notis donitaĵojn pri la prezentado aŭ temo, kun plej ofte resumo de la rakonto, kaj lingvaj malfacilaĵoj... Mi klopodis esti konciza kaj objektiva. Kompreneble tio ne pretendas esti kompleta studo, ĉar nur kelkajn infanlibrojn mi konas, kaj espereble daŭre aperos novaj; sed ĝi eble estos instigo pretigi konsulteblan sliparon, facile atingeblan kaj ... kompletigendan.

Antaŭ ol fini, mi deziras danki al personoj, kiuj helpis min iamaniere: S-ro CATIL, kiu kuraĝigis min entrepreni la studon kaj helpis pri teknikaj aferoj, F-ino TRIOLLE kaj U.F.E., kiuj pruntedonis multajn librojn, S-ino VINCENT, kiu larĝe malfermis por mi la ŝrankojn de Grésillon, S-ro DANVY, kiu akceptis pritrakti la bildstriojn, kaj ĉiuj, kiuj kontribuos al la publikigo de tiu ĉi kompilaĵo.

Noto 1: Principe la indikoj pri aĝoj estas jenaj, laŭ la franca lernosistemo:
"infanet-lernejo" = ĝis kaj inkluzive de la sesa jaro;
CP: 7a jaro; *CE 1*: 8a jaro; *CE 2*: 9a jaro; *CM 1*: 10a jaro; *CM 2*: 11a jaro.
Sed mi tre insistas, ke oni *ne* konsideru tiujn miajn indikojn koncerne la "nivelojn" rigide kaj dogme. Ili nepre estu nur orientiloj! J.G.

Noto 2: Iom da informoj pri porinfanaj libroj jam troveblas en la n-roj 1976/2, 1986/3, 1987/1 de nia revuo. La red.

Titolo: **Kies naztuko**
Eldono: Ĉina Esperanto-Eldonejo, Pekino.
Prezento: 17p. 17,5 × 20,5 cm. Multaj koloraj bildoj. Kelklinia teksto ĉiupaĝe. Ne tre grandaj literoj por infanetoj.
Nivelo: Infanetoj; CP
Temo: Knabino Hong-Hong perdis naztukon kun bildo de anaso. Ŝi trovas alian, esploras en la klasoj, ĉu iu perdis naztukon. Fine montriĝas, ke iu knabo perdis sian kaj retrovis la ŝian.
Teksto: Facile rakontebla, nur montrante la ilustraĵojn. Lingvaĵo facila.

Titolo: **Serĉi panjon**
Eldono: Ĉina Esperanto-Eldonejo, Pekino 1983.
Prezento: 22p. 18 × 17 cm. Simplaj, koloraj, allogaj bildoj. Kelklinia (1 ĝis 6) teksto ĉiupaĝe.
Nivelo: Infanetoj.
Temo: Kokino elkovas anasajn ovojn inter la propraj. Surprizo: anasidoj ne povas facile beki grajnojn kaj devas retrovi sian propran panjon por lerni sin nutri kaj vivi anaside.
Teksto: Lingvaĵo facila; tamen p.4 "informiĝinte" kaj p.7 "promenante".

Titolo: **Kiel kovi**
Eldono: Ĉina Esperanto-Eldonejo, Pekino.
Prezento: 25p. 17 × 18 cm. Multaj koloraj bildoj. Kelklinia teksto ĉiupaĝe.
Nivelo: Infanetoj; CP: CE1 (eble).
Temo: Kukolino deziras scii, kiel kovi. Ŝi petas laŭvice kokinon, strutinon, bucerinon, testudinon, anasinon, kaj konkludas ke estas pli facile kovigi siajn ovojn de alia...
Teksto: Lingvaĵo facila, sed multaj birdnomoj. (bucero = "calao", azia birdo).

Titolo: **Ĉion faru mem ni ĉiuj**
Eldono: Ĉina Esperanto-Eldonejo, Pekino.
Prezento: 10p. 17,5 × 20,5 cm. Koloraj, simplaj, beletaj bildoj. Kvarlinieta teksto ĉiupaĝe.
Nivelo: Infanetoj.
Temo: Knabineto mem vestas sin, sin lavas, kombas; matenmanĝas, ludas, riparas la ludilojn, lavas tuketojn, ktp.
Teksto: Lingvaĵo simpla. Rimarko: uzo de "unujn" en la dua teksteto.

KOLEKTO EL SVEDIO

Titolo: **Plupo kaj la lupo. — Plupo kaj la gruoj. — Plupo kaj la maro. — (ankoraŭ pliaj)**
Eldono: Progreso-Eldonejo, Motala (Svedio) 1986.
Prezento: 24p. 16 × 16,5 cm. Kartone bindita j. Artismaj, belaj bildoj. Montras la bestojn en ties medioj.
Nivelo: CE; CM.
Temo: Plupo estas estaĵeto, kiu povas paroli kun la bestoj. "Li estas nevidebla por ĉiuj homoj — krom por vi kaj mi", avertas la rakontanto. La ĉefa temo estas la vivo, kutimoj kaj moroj de la bestoj.
Teksto: Pli ellaborita ol en la antaŭe menciitaj libretoj. Ĝi estas facila rilate al la stilo, sed riĉa rilate al la vortaro. Multaj bestnomoj, plejofte el la nordaj landoj. Malmultaj preseraroj ("herbotuvo" por "herbotufo").

Titolo: **Simioj provas elakvigi la lunon.**
Eldono: Ĉina Esperanto-Eldonejo, Pekino 1981.
Aŭtoro: Xia XIA.
Prezento: 14p. 20,8 × 25,6 cm. Multaj koloraj bildoj.
Nivelo: Infanetoj, se konsideri la enhavon, sed CP kaj CE1 por legaĵo, ĉar la teksto estas iom pli longa ol oni atendus.
Temo: Fakte estas du rakontoj. En la unua (kiu donis la titolon al la libreto), vidante la lunon en puto, simioj provas elakvigi ĝin. Ili eĉ kunlaboras por tio, ĝis iu pli sagaca simio konstatas, ke ĝi estas samtempe en la ĉielo. En la dua rakonto la simioj imitemas. Du simioj ŝtelas pajloĉapelojn de kampulovendisto kaj ludas per ili. Poste la kampulo ekkoleras kaj la simioj imitas liajn gestojn, ĝis li ekhavas la ideon ĵeti teren la propran ĉapelon. La bestoj faras same, kaj li reprenas sian posedaĵon.
Teksto: Vidu "Nivelo".

Titolo: **La Marvirineto**
Eldono: KOKO 1962.
Aŭtoro: H.C. ANDERSEN; tradukita de SCHLEICHER.
Prezento: 70p. 21 × 27 cm. Bindita. Klara preso. Nigra-blankaj ilustraĵoj por la okpaĝa biografio pri ANDERSEN, verkita de Svend LARSEN; ĝenerale koloraj kaj plenpaĝaj por la fabelo mem, kun malgrandaj nigra-blankaj desegnaĵoj.
Nivelo: De iom grandaj infanoj ĝis ... ĉiuj.
Temo: Tutmonde konata fabelo pri "la eta sireno".
Teksto: Beletra. La traduko sekvas tiun de Zamenhof de proksime; nur iom modernigis ĝin. Ĉu pli trafe? Eble ne ĉiam tiel eleganta, sed tamen bona.

Titolo: **Petolema kaprido. – Lutro kaj bufo. – Du katetoj. – Brava kolombido. – Kokido venĝis sian panjon. – Heliko kaj ĝia domo.**
Eldono: Ĉina Esperanto-Eldonejo, Pekino. Unua eldono 1984.
Kolekto: «Fabeloj de Ĉinio». Ses titoloj.
Prezento: 18,5 × 21 cm. Tutpaĝaj koloraj bildoj. Sufiĉe granda literformato. Kelklinia teksto paĝe. Dika papero, sufiĉe fortika.
Nivelo: Infanetoj.
Temo: "Ili estas adaptitaj laŭ pri-bestaj legendoj popularaj inter la ĉinaj popolanoj. La pentristo personigas la bestojn kaj ornamas ilin per diverskoloraj naciaj kostumoj."
Teksto: Lingvaĵo facila.

Titolo: **La nigra kokino Miki.**
Eldono: Pola Esperanto-Asocio.
Prezento: 15p. 12 × 17 cm. Nigra-blankaj, magraj bildoj. Kvar paĝoj estas tute senbildaj.
Nivelo: CP, laŭ la enhavo eĉ infanetoj.
Temo: Du rakontoj. En la unua kokino vivas en domo kun siaj idoj. Vulpo ruze kaptas ilin. Hundo fine ilin savas. En la dua infanoj ricevas donace katidon. La unuaj tempoj de kunvivado.
Teksto: Aspektas pli kiel ekzerca legolibro ol kiel distra libro. Relative multe da teksto por tiel simplaj rakontoj.

Titolo: **Ĉevalido transiras riveron.**
Eldono: Ĉina Esperanto-Eldonejo. Pekino.
Prezento: 16p. 16 × 18,5 cm. Koloraj, ĉarmaj bildoj. Ĉiupaĝe kelklinia teksto (2, 3, ĝis 5 linioj).
Nivelo: Infanetoj; CP.
Temo: Ĉevalido, antaŭ ol trapasi riveron, petas konsilon de bovo kaj de sciuro. Ricevinte kontraŭdirajn respondojn, ĝi fine demandas la patrinon. Tiu igas ĝin pripensi kaj juĝi mem. Fine la ĉevalido feliĉe transiras la riveron kaj ricevas laŭdojn.
Teksto: Lingvaĵo ne malfacila. Tamen kelkaj kunmetitaj vortoj, -anta, -ante, predikativoj.

Titolo: **Lupo invitas urson.**
Eldono: Ĉina Esperanto-Eldonejo, Pekino.
Prezento: 35p. 20,5 × 18 cm. Belaj koloraj bildoj, preskaŭ plenpaĝaj. 2 ĝis 3 linioj paĝe. Iom malpli granda litertipo ol en la jam priskribitaj libretoj.
Nivelo: Infanetoj; CP; CE.
Temo: Lupo invitas urson kaj kuiras du kokojn. Vulpo ruze sukcesas manĝi la kokaĵon, trinki la vinon alportitan de la urso, kaj igi la du amikojn kvereli. Fine ili konscias pri la ruzo kaj repaciĝas.
Teksto: Kunmetitaj vortoj, -inta, -anta.

Titolo: **Infanoj en la mondo.**
Eldono: Dana UNICEF-Komitato, 1979.
Prezento: 32p. 30 × 21,5 cm. Simplaj, koloraj bildoj, desegnitaj de du infanoj.
Nivelo: CE; CM.
Temo: La teksto tiras la atenton al la ĉefaj bezonaĵoj de infanoj (akvo, nutraĵo, sano), al la malegaleco inter riĉaj kaj malriĉaj landoj (referenco pri riĉa lando estas Danlando), kaj al la neceso de interhelpo. Atentigo pri ekonomikaj maljustaĵoj.
Teksto: Simpla. Anglaj surskriboj sur la bildoj.

Titolo: **Nederlando.**
Eldono: Bruna kaj Zoon, Utrecht.
Kolekto: «La mondo en koloro».
Prezento: 104p. 17,5 × 12 cm. Tre multaj koloraj fotoj pri diversaj aspektoj de la lando.
Nivelo: Verdire ne propre infanlibro sed, miaopinie, interesa por iom grandaj infanoj; eble en CM2.
Temo: Priskribo de Nederlando; bona geografia komplemento, eĉ se oni ĉefe interesiĝas pri la koloraj fotoj.
Teksto: Dokumenta, serioza, ne speciale facila nek malfacila. Sed kio pri la ceteraj verkoj en la kolekto? Ĉu aliaj jam eldoniĝis?

Titolo: **La avino-ursino**
Eldono: Ĉina Esperanto-Eldonejo, Pekino.
Prezento: 46p. 18,5 × 17 cm. Koloraj bildoj, preskaŭ plenpaĝaj. Ne tre grandaj literoj; 2 ĝis 3 linioj paĝe.
Nivelo: CE1, CE2.

Temo: Dum foresto de gepatroj, ursino ruze prenas lokon de la avino. La du infanoj (gefratoj) aŭdis pri ĝi kiel hommanĝanto. Dank'al pluraj lertaj kaj sagacaj ruzoj, la knabino ne nur savas ilin ambaŭ, sed mortigas la ursinon.
Teksto: La ĉina nomo de la knabino (Ginhua) povas iom ĝeni "okcidentajn" infanojn. Kelkaj -ante kaj -inte. Malofta vorto *urušio* = japana planto, kies frukto donas oleon. (La knabino uzas ĝin kiel glitigan substancon.)

Titolo: **Hejmoj de birdoj.**
Eldono: Ĉina Esperanto-Eldonejo, Pekino.
Aŭtoro: Teksto de Ju ZI, kaj ilustraĵoj de Wu DAISHENG.
Prezento: 40p. 18 × 20,5 cm. Plaĉaj koloraj bildoj, kiuj montras diversspeciajn birdojn kaj ties nestojn. Kelkaj plenpaĝaj. La teksto sur kelkaj linioj paĝe, didaktika.
Nivelo: CE; CM.
Temo: Dekduo da birdoj, iliaj nestoj kaj ties konstruo.
Teksto: Facilaj frazoj, sed multaj birdnomoj — ja plejparte apartenantaj al niaj regionoj, sed kelkaj malpli konataj.

Titolo: **Foĉjo kaj Ozak.**
Eldono: (Ne indikita), Aix-en-Provence (Francio) 1979.
Prezento: 13 paĝoj, unuflanke presitaj. 30 × 21 cm. Bildoj nigra-blankaj.
Nivelo: "Verkita de infanoj 6-7-8-jaraj, post Esperanto-kurso".
Temo: Pri fokido kaj eskima infano.
Teksto: Rakonto kaj desegnaĵoj naivaj sed ĉarmaj. Verkita de infanoj por infanoj.

Titolo: **La varma Sudo kaj frosta Nordo.**
Eldono: Ĉina Esperanto-Eldonejo, Pekino.
Prezento: 19p. 14 × 18 cm. Belaj, koloraj bildoj; 9 ĝis 10 linioj paĝe.
Nivelo: CE1, CE2.
Temo: Du geknaboj, amikoj, iras pro familiaj kaŭzoj, la knabo al la Nordo, la knabino al la Sudo. Ili rakontas telefone siajn spertojn en paralelaj tekstetoj. Ambaŭ patroj estas laboristoj. Aludo al diverseco en Ĉinio, ties liberiĝo, kaj deziro al venko de socialismo.
Teksto: En versoj, tamen facila.

Titolo: **Heroaj fratinetoj sur la stepo.**
Eldono: Ĉina Esperanto-Eldonejo, Pekino.
Prezento: 89p. 26 × 18 cm. Belaj bildoj plenpaĝaj. Du ĝis tri grandaj linioj paĝe.
Nivelo: CE1, CE2.
Temo: Rakonto tirita el filmo kaj resumita komence de la libro: Du knabinoj savas ŝafojn el neĝoŝtormo kaj kuraĝe frontas danĝeron.
Teksto: Streĉa kaj interesa, sed politike orientita.

Titolo: **Konstrui novan ponton.**
Aŭtoro: Adaptita de Wan YUN.
Eldono: Ĉina Esperanto-Eldonejo, Pekino.
Prezento: 37p. 17 × 19 cm. Kartone bindita. Plaĉaj koloraj ilustraĵoj.
Nivelo: CE, CM.

Temo: Kvar bestoj, amikoj, volas kunlabore konstrui novan riverponton. Sed vulpo provas delogi du el ili. Tamen la aliaj du konvinkas ilin ree kunlabori kaj kune ili sukcesas, dank'al inteligenta organizo. Dume ili kaptas la vulpon.
Teksto: Kelkaj facilaj kunmetaĵoj; -ante, -inte. Dubaj formoj: "arbon rampatan de rotango"; ĉe paĝo 34 ne tute klare "sed ĝi forkuris tuj" — ja temas pri la "vulpaĉo", ne pri la elefanto.

Titolo: **Anaseto kaj Koketo. – Brasiko kaj ĝia semo. – Malgranda Simio.**
Eldono: Ĉina Esperanto-Eldonejo, Pekino. Unua eld. 1985.
Prezento: Respektive 14, 8, kaj 5p. 17,5 × 15 cm. Koloraj bildoj, 3 plenpaĝaj. Teksto: 1 ĝis 3 linioj paĝe.
Nivelo: Infanetoj.
Temo: Tre simplaj pribestaj rakontoj. Koketo unue helpas anaseton, donante insektojn, sed poste — malgraŭ konsilo de la amiko — la koketo iras en akvon kaj dronus sen la helpo de la alia. Same simplaj estas la aliaj du rakontoj.
Teksto: Facila.

Titolo: **Nova vesto de la pupo.**
Eldono: Fremdlingva Eldonejo, Beijing. Unua eldono 1979.
Prezento: 16p. 18 × 21 cm. Koloraj, ĉiupaĝaj bildoj. Teksto de 2 ĝis 5 linioj paĝe. Ne tre grandaj literoj.
Nivelo: Infanetoj.
Temo: Knabino Xiao Zhen rimarkas difektitan pupon inter la infanĝardenaj ludiloj. Ŝi petas permeson forporti ĝin. Ŝi riparas la pupon kaj ŝia patrino kudras novajn pupvestaĵojn. Poste la knabineto reportas la pupon al la lernejo.
Teksto: Sufiĉe facila por infanetoj, escepte la nomon de la knabino.

Titolo: **Kolorigu!**
Aŭtoro: Kompilita de Ming JOŬ; ilustrita de Ĝeng MAN.
Eldono: Ĉina Esperanto-Eldonejo, Pekino 1983.
Kolekto: Serio de 6 kajeroj pri bestoj kaj floroj.
Prezento: 24p. 18 × 20,5 cm. Pri ĉiu besto aŭ floro 2 bildoj: unu kolora kiel demonstra modelo, la alia laŭ la katalogo tute nigra-blanka. Tamen, laŭ propra observo en "Aminda Ursido" la dua estas jam parte kolorita. La bildoj mem estas plaĉaj. Unulinia frazeto sub la modelaj bildoj.
Nivelo: Infanetoj, CP.

Titolo: **Vostokonkurso.**
Aŭtoro: Wang ZHENHUA.
Eldono: Ĉina Esperanto-Eldonejo, Pekino. Unua eld. 1983.
Prezento: 16p. 18 × 20,5 cm. Ĉiupaĝaj koloraj bildoj. Du ĝis kvar linioj paĝe.
Nivelo: CP, CE.
Temo: Bestoj organizas amuzvesperon kun vostokonkurso.
Teksto: Amuza, facila, simpla. Strangaĵoj estas la uzo de "li", parolante pri karpo, kaj "ŝi" por sciuro.

Titolo: **Neĝa infano.**
Aŭtoro: Kompilita kaj pentrita de Liu Si.
Eldono: Ĉina Esperanto-Eldonejo, Pekino. Unua eldono 1981.
Prezento: 36p. 18 × 20,8 cm. Plaĉaj koloraj bildoj. Du ĝis tri linioj da teksto paĝe.
Nivelo: Infanetoj.
Temo: Kunikleto konstruas, helpe al la patrino, neĝinfanon. Dum iam la patrino forestas, ekbrulas la domo, kaj la neĝinfano savas la kunikleton, koste de sia propra vivo.
Teksto: Simpla. Anstataŭ "neĝinfano" okcidentanoj dirus "neĝhomo". Ĉinaj apartaĵoj: "longano" = planto kun nigraj grajnoj; "hibaĉo" = speco de hejtilo potoforna, en kiu oni bruligas lignon.

Titolo: **Malatentema virino.**
Aŭtoro: Fan YUAN.
Eldono: Ĉina Esperanto-Eldonejo, Pekino. Unua eld. 1983.
Prezento: 22p. 18 × 20,5 cm. Koloraj bildoj ĉiupaĝaj. Kelkaj mallongaj linioj da teksto paĝe.
Nivelo: Infanetoj, CP.
Temo: Amuza historio pri treege malatentema dika virino, kiu havas dikan bebon kaj agas vere tre senpripense, eĉ perdante ĝin. Povus esti katastrofo, sed ĉio finiĝas bone.
Teksto: Facila, amuza. "Vakskukurboj" ŝajnas esti "kukurbetoj".

Titolo: **La suno estas senkosta.**
Aŭtoro: Iben kaj Nynne HOLM-LAURSEN.
Eldono: Dana Esperanto-Eldonejo, Haarus 1978.
Prezento: 8p. 21 × 14,5 cm. Nigra-blankaj infandesegnaĵoj. Paĝoj nur unuflanke kun teksto. Kelkaj linioj paĝe.
Nivelo: Infanetoj.
Teksto: Simpla, verŝajne verkita de infanoj.

Titolo: **Sportistetoj.**
Eldono: Fremdlingva Eldonejo, Beijing 1981.
Prezento: 24p. 18 × 20,5 cm. Koloraj bildoj, tre klaraj, kiuj prezentas diversajn sportojn praktikeblajn de junaj infanoj.
Nivelo: Infanetoj.
Teksto: Nur titoloj de la bildoj.

Titolo: **Riverdefenda Skemo.**
Eldono: Fremdlingva Eldonejo, Pekino 1977.
Prezento: 86p. 18,5 × 17 cm. Ĉiupaĝaj nigra-blankaj bildoj. Kelklinia teksto paĝe.
Nivelo: 13-14-jaraj knaboj.
Temo: Militrakonto kompilita laŭ revolucia historio "Rivera Torento". La lukto inter komunistoj kaj la Kuomintang-armeo. Kiel la komunistoj ruze akiris la riverdefendan skemon de la malamikoj en 1949.
Teksto: Ĉinaj nomoj de relative multaj roluloj postulas atenton. Unu nomiĝas "Kiu", kio povas esti erariga, kiam ĝi aperas komence de frazo. Kelkaj militistaj terminoj: "rekognosko, glaciso, fuorto..."

Titolo: **La blankaj gardistoj.**
Aŭtoro: D-ro HEILIGSTEIN. Elkroatigis BARKOVIĆ.
Eldono: «La Juna Penso», Laroque Timbaut 1980.
Prezento: 62p. 14 × 21 cm. Preso ofseta. Nigra-blankaj desegnaĵoj, simplaj kaj plenpaĝaj, kiuj montras formojn de baciloj k.s.
Nivelo: Junaj adoleskantoj, 12-14-jaraj.
Temo: La maniero laŭ kiu la blankaj sangoglobuletoj ("blankaj gardistoj") luktas kontraŭ invadintaj bakterioj ("banditoj"), en formo de interesaj rakontoj. Kompletigas tiujn higienaj konsiloj por preventi infektajn malsanojn.
Teksto: Popularscienca por gejunuloj. Sufiĉe facila, sed postulas bonan praktikan konon de Esperanto. Kelkaj strangetaj uzoj de "ke"; "profilakso" anstataŭ "profilaktiko" (PIV); p.28 "Dum konversacio ne spiru alies nazon."

Titolo: **Hundbazaro.**
Aŭtoro: Péter András RADOS (red.).
Eldono: Hungara Esperanto-Asocio, Budapest 1979. Eldonita okaze de la Internacia Jaro de la Infano.
Prezento: 67p. 12 × 18 cm. Dukoloraj bildoj, ruĝa-nigraj.
Nivelo: Ĉu pri-infanaj aŭ por-infanaj? Unuavide pli multe pri ol por infanoj.
Temo: 33 hungaraj infanpoemoj.
Teksto: Inter la tradukintoj troviĝas KALOCSAY kaj Imre SZABÓ: garantio de kvalito. Sed ĉu tio interesos infanojn?

Titolo: **Interŝanĝo de rizsemoj.**
Eldono: Fremdlingva Eldonejo, Pekino 1976.
Prezento: 28p. 18,5 × 16 cm. Koloraj bildoj ĉiupaĝaj. Ĝis 10 linioj paĝe.
Nivelo: CM (?).
Temo: Produktbrigadoj interŝanĝas rizosemojn, eĉ donante la proprajn rezervojn pro bonkoreco, por helpi aliajn komunumojn.
Teksto: Multe da ĉinaj personaj nomoj. Iom politika. Ĉu entute tre interesa por infanoj...?

Titolo: **Bela revulo.**
Aŭtoro: Kompilita de Geng GENG
Eldono: Ĉina Esperanto-Eldonejo, Pekino 1979-1983.
Prezento: 38p. 18 × 20,5 cm. Koloraj bildoj, preskaŭ plenpaĝaj, fantaziaj. 2 ĝis 4 grandaj linioj paĝe.
Nivelo: CP, CE.
Temo: Bela birdeto, memkontenta pro sia beleco, provas lerni multon, sed ĉiam denove rezignas pro kuraĝmanko. Kiam venas vintro, ĝi povas elteni nur dank' al la helpo de aliaj. Fine ĝi promesas lerni la necesajn vivaferojn.
Teksto: Kunmetitaj vortoj, participoj, -ig kaj -iĝ, iom multaj terminoj.

Titolo: **Vizito de prezidento.**
Aŭtoro: Jerzy ZAWIEYZKI.
Eldono: Pola Esperanto-Asocio, 1984.
Prezento: 36p. 14,5 × 20,5 cm. Nigra-blankaj bildoj naivaj, desegnitaj de infanoj.
Nivelo: Eble por adoleskantoj kaj pliaĝuloj — ja pensiga *pri*-infana libro.
Temo: Laŭ la eldonista prezento: "En tiu ĉi rakonto, Zawieyzki prezentas psikologian portreton de sesjara knabo, kies patro eksedziĝis. La knabo vivas kun

nova 'panjo' kaj nova 'avinjo'. Al la patro li ĉiam memorigas la malŝatatan eksedzinon. Vivante en tia atmosfero, la knabo havas ĉion escepte de la gepatra amo kaj familia varmo. Kaj tiam intervenas... la Prezidento. La rakonto kortuŝe kvankam samtempe dolorige konfrontas la belajn revojn de la etulo kun la kruela realo..."

Teksto: Jam literatura verko. Kelkaj vortoj klarigitaj ĉe la fino; i.a. "divorci, fola, kontumaco" — ĉi-lasta ne en la signifo de PIV.

Titolo: **Hungaraj Fabeloj.**
Aŭtoro: Elek BENEDEK (1889-1929), unu el la fondintoj de la hungara porinfana literaturo. Li kolektis fabelojn kaj legendojn kaj rekreis popolfabelojn.
Eldono: Hungara Esperanto-Asocio. Dua eldono 1983.
Prezento: 70p. 14 × 20 cm. Po unu nigra-blanka ilustraĵo por ĉiu rakonto.
Nivelo: Geknaboj de elementa lernejo.
Temo: Dek fabeloj, tre diversaj, jen enscenigante bestojn, jen reĝojn, reĝinojn, feojn, lertajn knabojn, kiuj elturniĝas pro bonkoreco aŭ sagaceco. en formo de interesaj rakontoj. Kompletigas tiujn higienaj konsiloj por preventi infektajn malsanojn.
Teksto: Vigla, ne ĉiam facila. Malkorekta uzo de "nek" = "eĉ ne" (je paĝoj 24 kaj 68). Ie mankas akuzativo... Eble ankoraŭ pliaj detaletoj.

Titolo: **Dek Fabeloj**: lernolibro por grupa legado aŭ hejma studado.
Aŭtoro: Charlotte KOHRS kaj Dorothy KRUGER
Eldono: «Libroj en Esperanto», San Diego, CA (Usono).
Prezento: 36p. 27,6 × 21 cm. Bele presita. Desegnaĵoj nigra-blankaj, unu por ĉiu fabelo.
Nivelo: Unuagrada lernejo; bona post-kursa legolibro. Spite la asertojn de la aŭtorinoj en antaŭklarigo, la fabeloj ŝajnas tro infanecaj por plaĉi al plenkreskuloj.
Temo: Fabeloj, el kiuj pluraj konataj en Eŭropo ("Ruĝkokineto, La tri ursoj" ktp.) aŭ nur en Usono. Ili enscenigas bestojn aŭ simplajn homojn.
Teksto: La didaktika spirito montriĝas per Esperanto-anglaj vortlistoj ĉe ĉiu fabelo, kaj listo de afiksoj, de korelativoj, de ekzercoj ĉe la fino. La rakontoj estas adaptitaj de la aŭtorinoj kun ripetiĝaj f

Titolo: **Ribelo kontraŭ la Ĉiela Palaco. – Sun VUKONG trifoje batis la spiriton de Blanka Skeleto – Senmortigaj Fruktoj**.
Aŭtoro: Adaptitaj de Tang DENG.
Eldono: Fremdlingva Eldonejo, Beijing. Unua eld. 1980.
Kolekto: Bildlibroj tiritaj el la ĉina mita romano "La Pilgrimado al la Okcidento" en kiu ĉefrolas la simio-reĝo Sun WUKONG (nun menciata per simpla "V").
Prezento: 88p. 18 × 20,5 cm. Koloraj bildoj, delikataj kaj elvokivaj, faritaj laŭ la desegnita filmo samtitola. 2 ĝis 5 grandaj linioj paĝe.
Nivelo: Unuagrada lernejo. Bildrakonto povas interesi diversaĝajn geknabojn laŭ la maniero de legado aŭ nur bildrigardado.
Temo: La priskribata ribelo de la unua bildlibro ĉefe pritraktas la nesubigeblecon kaj saĝecon de la simio-reĝo. Ne mankas magiaĵoj, vigleco, abruptaj ŝanĝiĝoj de situacioj.
Teksto: Vigla, sufiĉe facila.

Titolo: **Ĉasado kun avĉjo.**
Eldono: Fremdlingva Eldonejo, Pekino 1965.
Aŭtoro: Redaktita de «Ĉina eldonejo por Geknaboj».
Prezento: Koloraj bildoj, tri plenpaĝaj, kaj multaj aliaj. Teksto iom longa, foje 10 ĝis 16 linioj paĝe. Klara preso.
Nivelo: CE2 ĝis CM.
Temo: Knabo Najan, en neĝa regiono, partoprenas ĉason kun Avĉjo, du hundoj kaj du ĉevaloj. Ili mortigas linkon, sciurojn, urson.
Teksto: Sufiĉe facila, sed pluraj bestnomoj.

Titolo: **Bestĝardeno.**
Aŭtoro: Teksto de Lin Song LING, ilustraĵoj de Ĝan TONGŜJŪAN.
Eldono: Ĉina Esperanto-Eldonejo, Pekino 1985.
Prezento: 70p. 17 × 20 cm. Kvarversoj por ĉiu besto. Plenpaĝaj koloraj bildoj; etaj ilustraĵoj sur la tesktopaĝoj, tre sugestaj.
Nivelo: CP al CM laŭ tio ĉu oni uzas nur la bildojn aŭ ankaŭ la tekstojn.
Teksto: La tuto estas poezia; lingvaĵo sufiĉe facila.

Titolo: **Pesi elefanton.**
Aŭtoro: Diversaj tekstverkistoj kaj pentristoj.
Eldono: «El Popola Ĉinio», 1981.
Prezento: 91p. 18 × 21 cm. Ses libretoj. Ĉiu rakonto estas 14-paĝa, kun 1-2-linia teksto paĝe. Tipe ĉinaj, artismaj, koloraj ilustraĵoj, ĉiupaĝaj.
Nivelo: CP ĝis CE.
Temo: Ses rakontoj: "Kiel pesi elefanton – Lerni kaligrafion – Elpreni pilkon – Rompi grandan akvarion – Pentri lotuson". Ĉiuj rakontoj enscenigas infanojn, kaj ĉiam venkas sagaco, persistemo aŭ laboremo.
Teksto: Facila; tamen streĉa, ĉar en ĉiu rakonto estas malfacila situacio. Domaĝe, ke oni ne indikis la prononcmanieron de malfacilaj ĉinaj nomoj, kiel ekzemple *Xizhi* k.s.

Titolo: **Morso-Klubo.**
Aŭtoro: Robert FISKER; tradukita el la dana.
Eldono: Dansk Esperanto Forlag, 1977.
Prezento: 31p. 20 × 14 cm. Ofsete presita, sed klare. Desegnaĵoj nigra-blankaj, sufiĉe multaj.
Nivelo: "Por mezgradaj geknaboj"; CM kaj iom poste.
Temo: Du rakontoj. En la unua — "Morsa Klubo" — Ole, dank'al la morsa alfabeto, kiun li praktikas kun kelkaj kamaradoj, eltiras sin el malfacila situacio en foresto de la gepatroj. Streĉa rakonto 17-paĝa.
En la dua — "Trezor-serĉado" — la samaj knaboj serĉadas 'trezoron'. Amuza rakonto 11-paĝa.
Teksto: Simpla, senpera, sen grandaj malfacilaĵoj.

Titolo: **Ĉeĥaj Fabeloj, laŭ popolaj temoj.**
Aŭtoro: Rerakontitaj de Valda VINÁR.
Eldono: Amo-Akademio, Japanio 1962.
Prezento: 74p. 13 × 19 cm. Ses kolorbildoj plenpaĝaj. Iom pala preso.
Nivelo: Aĝo de la mirrakontoj, iom varia.

Temo: La aŭtoro aludas la malfeliĉaĵojn de la lando, dum kiuj mirrakontoj helpis transdoni al la infanoj la necesajn virtojn: kuraĝon, justecon, ktp. Ne mankas reĝoj, reĝinoj, malbonaj kaj bonaj homoj, magiistoj kaj parolantaj bestoj. Kutimaj temoj pri la provoj por akiri fianĉinon; pri reĝido enkorbe konfidita al rivero, en la espero ke li pereos, ktp.

Teksto: Sufiĉe facila lingvo, sed kelkaj strangaĵoj: "nia salprovizo degelis"; ĉu "fandiĝis, perdiĝis"? (p.8). Ankaŭ kelkaj preseraroj kaj gramatikaj eraroj: "ŝprucite per tiu akvo" ("ŝpruci" ja ntr.).

Titolo: **La fiera multkolora kateto.**
Aŭtoro: Geng GENG.
Eldono: Ĉina Esperanto-Eldonejo, Pekino. Unua eldono 1979; dua eldono prilaborita 1983.
Prezento: 40p. 18 × 20,5 cm. Koloraj kaj allogaj bildoj, preskaŭ tutpaĝaj. 3-4 linioj paĝe.
Nivelo: Laŭ enhavo CP, CE, sed la lingvaĵo estas malfacila.
Temo: Fabelo, preskaŭ fablo. Multkolora kato, pentrita de knabino, foriras tra la mondo, fanfaronante pri sia beleco. La ceteraj bestoj renkontitaj donas lecionon al ĝi.
Teksto: Multe da kunmetitaj vortoj kaj kompleksaj verbotempoj, *-ig* kaj *-iĝ*. Tro malfacila se konsideri la infanan rakonton.

Titolo: **Winnie-la-Pu.**
Aŭtoro: A.A. MILNE. Esperanta versio de *Winnie-the-Pooh;* antaŭparolo (en la angla), gramatikaj klarigoj, kaj glosaro Esperanto-angla de Humphrey TONKIN.
Eldono: Dutton & C°, Novjorko 1972.
Prezento: 164p. plus IX (142 por la Esperanto-teksto). 13,5 × 19,5 cm. Bindita. Preskaŭ ĉiupaĝe spritaj, nigra-blankaj bildoj.
Nivelo: CE1, CE2; sed eble por la unua jaro de mezlernejo, se konsideri la anglan parton, kvankam la celo estas prezenti Esperanton al anglaj infanoj. Eble komparo kun la angla versio estus profitodona al la lernantoj.
Temo: Aventuroj de infano kun ludil-bestoj, inter kiuj la kara urseto Winnie-la-Pu. Ili ekvivas, ĉiu kun propra personeco, kaj travivas verajn aventurojn en ĉirkaŭa arbareto.
Teksto: Plej amuza kaj sprita. Facila lingvaĵo. Foje la infano aŭ iu besteto kripligas vorton, kun tre komika rezulto.

Titolo: **Kiel Bretono iĝis reĝo de Anglujo.**
Aŭtoro: Per Jakez HELIAS. Ilustrita de junaj anoj de la Esperanto-grupo «Vekiĝu" el Hennebont.
Eldono: G.E.E. – I.L.E.I.
Prezento: 56p. 14,5 × 21 cm. Desegnaĵoj plenpaĝaj, nigra-blankaj bone ilustras la rakontojn.
Nivelo: CE1, CE2; la antaŭparolo celas instruistojn aŭ gepatrojn.
Temo: Entute kvar historioj, kiujn rakontas avo al geknaboj. Ili estas samtempe amuzaj kaj edukaj, apartenas al la regiona folkloro de Bretonujo.
Teksto: Ne malfacila, tre korekta.

Titolo: **Kapti vulturon viva.**
Aŭtoro: Huang ĜENG.
Eldono: Fremdlingva Eldonejo, Pekino. Unua eldono 1977.
Prezento: 59p. 17,5 × 25 cm. Ĉiupaĝe koloraj bildoj kaj 2 ĝis 5 grandaj linioj da teksto.
Nivelo: CE, CM.
Temo: Klopodoj de du kamparaj infanoj por kapti viva vulturon, kiu malutilas al anasaro bredata de la komunumo. Ili venkas ĉiuspecajn malfacilaĵojn por "protekti la riĉaĵon de la kolektivo".
Teksto: Povas iom ĝeni okcidentajn infanojn la ĉinaj propraj nomoj. Lingvaĵo ne tro malfacila.

Titolo: **Kvin herooj sur Langla Monto.**
Eldono: Fremdlingva Eldonejo, Pekino 19677
Prezento: 40p. 18,5 × 17 cm.
Nivelo: Ne speciale infana.
Temo: Epizodo el la kontraŭjapana milito, okazinta en Ĉinio en 1941.

Titolo: **Krutaĵo "Fluganta Aglo".**
Eldono: Fremdlingva Eldonejo, Pekino 1975.
Prezento: 156p. 18,5 × 17 cm.
Nivelo: Ne speciale infana, politika.
Temo: Epizodo el la "liberigo" de Ĉinio ĉ. 1950.

Titoloj: **La feliĉa birdo – Rano-rajdisto – Ĝomaĝi.**
Aŭtoro: Tibetaj popolrakontoj.
Eldono: Ĉina Esperanto-Eldonejo, Pekino 1984.
Prezento: 56p. 11 × 18 cm. Bildetoj nigra-blankaj.
Nivelo: Aĝo de la mirrakontoj, varia laŭ la infanoj. Povas utili kiel postkursa legolibro.
Temo: La unua rakonto devus titoliĝi "la feliĉiga birdo", ĉar ĝi fakte donas feliĉon, se homo nur povas atingi ĝin, superante monstrojn kaj terurajn provojn. En la dua oni vidas, kiel rano transformiĝas en rajdiston. La tria rakontas pri la ĝojo kaj malĝojo, kuniĝo kaj disiĝo de bela feino kun reĝido.
Teksto: Sufiĉe facila.

Titolo: **La aventuroj de ŝpar- kaj alia porketoj.**
Aŭtoro: Verkis Rik DE ROOVER; ilustris Kris DE ROOVER.
Eldono: Flandra Esperanto-Ligo, Antverpeno. Unua eldono 1982.
Prezento: 80p. 14 × 31 cm. Desegnaĵoj nigra-blankaj, beletaj. Bona preso kun sufiĉe granda litertipo, belaspekta.
Nivelo: CM1, CM2. Intencita por dekjaruloj kaj pli aĝaj; tamen, la historio tre naiva eble taŭgus por pli junaj, sed bona scio de Esperanto necesas.
Temo: Knabo kolektas monerojn en sia ŝparporketo, sed tiu ĉi enuas kaj forlasas la domon. En preĝejo ĝi renkontas alian porketon statuan, kiu ankaŭ enuas. La preĝeja porketo prenas la lokon de la alia, sed kompreneble ne entenas

monerojn! Sekvas serio de neverŝajnaj, komikaj aventuroj. La fono estas la antverpena vivo kaj la katolika eklezio.

Teksto: Ĝenerale korekta lingvaĵo, sed kelkaj strangaĵoj: "estas (sonas) alie ol alie". Plurloke "smajlo" (el la angla *smile*) por "ridego" — kial tiu nenecesa vorto? Plurfoje aperas evidenta preseraro "fór".

Titolo: **Joĉjo, la amiko.**
Aŭtoro: Elsa OTTO.
Eldono: Internacia Esperanto-Instituto, Nederlando 1980.
Prezento: 94p. 11,9 × 16 cm. Fajnaj, nigra-blankaj desegnaĵoj. Oni povas iom bedaŭri la tro modestan aspekton de tiu ĉi bona libro.
Nivelo: Ekde CM, se la infano ŝatas legi. Legolibro por komencantoj.
Temo: Historio de infano, kiu komence estas tute indiferenta al Esperanto, sed poste lernas ĝin de la instruisto, kiu iniciatis kurson. La vivo de Joĉjo estas tre interesa, eventoriĉa. Li estas simpatia knabo, kun kiu junaj legantoj povus faciłe identiĝi.
Teksto: La aŭtoro "klopodis uzi plej simplan lingvon, se eble evitante participojn kaj aliajn kunmetitaĵojn, kiuj ofte fortimigas la komencantojn." Preseraroj listigitaj sur aparta folieto. Strangaĵo: "la beko" parolante pri hundo (p.50). Eble en la lasta parto, la klarigoj pri Esperanto-asocioj, UEA, ktp. ŝajnos iom tedaj al pli junaj legantoj.

Titolo: **La fiera generalo.**
Aŭtoro: Hŭa ĜIUN'U; tradukita de Laŭ LUM.
Eldono: Ĉina Esperanto-Eldonejo, Pekino. Dua eldono 1985.
Prezento: 22p. 17,5 × 25 cm. Koloraj bildoj sur ĉiu paĝo. Kelkaj grandaj tekstlinioj paĝe.
Nivelo: CE2, CM.
Temo: Lerta generalo, sed tre fiera, aŭskultas flatanton, sin donas al diboĉo kaj ... estas venkita de malamikoj.
Teksto: Facila, sed aperas nomoj de ĉinaj mezurunuoj: "lio" (por "longo") kaj "ĝino" (por pezo).

Alvoko

OFICIALAJ ESPERANTO-KURSOJ JE SUPERA NIVELO, EN UNIVERSITATOJ KAJ SAMGRADAJ LERNEJOJ

G. PIRLOT

Dum junio 1988 mi planas aperigi novan eldonon, la 7-an, de mia libreto *Oficiala situacio de la Esperanto-instruado en la mondo*, kies enhavon nepras ĝisdatigi. Por tio mi bezonas ĉu konfirmon pri la informoj, jam menciitaj en la 6-a eldono, ĉu korektojn se io ŝanĝiĝis ekde januaro 1986, ĉu detalajn sciigojn pri novaj kursoj (prefere) laŭ la ĉi-posta respond-modelo.

Se vi persone konas kursgvidantojn de **oficiala** Esperanto-kurso en universitato aŭ samgrada instituto (post mezgrada lernejo), bonvolu instigi ilin ĉu rekte kontakti min, ĉu nepre respondi al la enketilo, kiun mi baldaŭ dissendos. Laŭokaze sciigu al mi ilian privatan kaj/aŭ lernejan adreson. Antaŭdankon!

Mia adreso:
G. PIRLOT, Kemmelbergstr. 5, b3, B-8400 Oostende, Belgio.

RESPOND-MODELO

Leĝa situacio en elementaj, mezgradaj, kaj superaj lernejoj:

NEDERLANDO — Laŭ Reĝa Decido (de 23-12-1964), publikigita en la "Ŝtata Gazeto" (de 14-01-1965) sub n-ro 574, estis enkondukita la ŝtata *L.O.*-diplomo pri Esperanto, kiu estas akirebla nur de profesiaj instruistoj. Ili estas pagataj por la E-instruado. (*L.O.* = *Lager Onderwijs* – "elementa instruado").

Oficialaj Esperanto-kursoj en universitatoj kaj superaj institutoj:

1. Nomo de la universitato aŭ de la instituto,
   (a) en Esperanto
   (b) en la nacia lingvo + la kompeta adreso[1] (per latinaj literoj):

   Universitato de Provenco / *Université de Provence (ILGEOS):* [2] *Institut de Linguistique Générale et des Etudes Orientales et Slaves* ("Instituto pri ĝenerala lingvistiko kaj pri orientaj kaj slavaj lingvoj") — 29, avenue R. Schuman, F-13621 Aix-en-Provence.

2. Kursgvidant(in)o(j) kun titolo kaj privata adreso[3]:

   Prof. Michel DUC-GONINAZ,
   Val St-Georges, Chemin de l'Echelle
   F-13100 Aix-en-Provence.

3. Kurso:
   (a) ekde kiam[4] (ekz. 1970)
   (b) mallonga priskribo:

   - kadre de la instituto pri ĝenerala lingvistiko kaj pri orientaj kaj slavaj studoj *(ILGEOS)*;
   - du jaroj, 1½ horoj/semajne; nome 1-a: bazaj scioj, 2-a: perfektiĝo kaj enkonduko al la literaturo;
   - post sukceso en ekzameno, la studentoj ricevas universitatan diplomon *"Attestation d'études préparatoires à l'Espéranto"* aŭ/kaj povas elekti Esperanton en la kadro de la ŝtataj diplomoj *DEUG,* aŭ *licence* ("licencio") de kiuj ĝi konsistigas 10%.

   (c) la kursgvidant(in)o estas pagata: *jes? ne?*

Rimarkoj

1. Kompleta adreso de la universitato aŭ instituto ebligas rektajn kontaktojn, precipe por starigi fakajn rilatojn kaj interŝanĝi materialon, spertojn, kaj tiel plu.
2. Nepre klarigu la uzitan siglon!
3. Privata adreso utilas por peti pliajn informojn, sed ĝi ne estos menciita en la broŝuro.
4. Temas pri la dato de malfermo de la kurso; gravega informo por la statistikoj!

Alvoko 2

ESPERANTO EN UNIVERSITATOJ KAJ SUPERAJ INSTITUTOJ

(Korektoj pri kursoj, menciitaj en «Oficiala situacio de la Esperanto-instruado en la mondo", 6-a eldono, junio 1986.)

Aŭstralio

La kurso ne plu okazas ĉe *Western Australian College* en Perth, laŭ sciigo de S-ino V. PAYNE (30-04-1987)

Ĉinio

9. *Dalian (Liaoning): a) Daljan-a Instituto de Teknologio / *Dalian Gongxueyuan Yingyong-Shuxue-Xi, Dalian 116024, Liaoning*; b) Vicprof. Shao RONG (Soliva); c/A) Ekde septembro 1984. Nedeviga, dua fremdlingvo por studentoj de la 2a, 3a kaj 4a jaroj el diversaj fakultatoj. Unu semestro, 2½ h/sem (sume 40h). c/B) Ekde septembro 1985. Nedeviga, dua fremdlingvo por studentoj de la 2a, 3a kaj 4a jaroj el diversaj fakultatoj pri lernprogramoj kaj esploraj studentoj. Unu jaro, 3 h/sem (sume 96h). Kun poentoj je la fino de ĉiu semestro post sukcesa ekzameno.

20. Kunming (Yunnan): a) Yunnan-a Universitato / *Yunnan Daxue, Kunming, Yunnan*; b) Zhou QIANYUN, Qin KAIJI, Zhang ZAI, Li KEXI, Chen SHIDE, Si YIMING; c) Ekde septembro 1984. Deviga kurso, 2 jaroj, 12 h/sem (sume ĉ. 700h).

26. *Nanning (Guangxi): a) Nacia Instituto / *Guangxi Minzu Xueyuan, Xixiantang xilu 74, Nanning, Guangxi*; b) Liang ZIMING (P); c/A) Ekde aprilo 1984. Unu semestro, 4 h/sem; bazaj scioj, por studentoj de la Fakultato pri Ĉinlingvo-Literaturo; c/B) Ekde aŭgusto 1984. Du jaroj, 4 h/sem; 1a, bazaj scioj; 2a, perfektiĝo kaj enkonduko en E-literaturon; 3a, praktikado pri E-

instruado; por studentoj en la Fakultato pri Fremdlingvoj. Post sukcesa ekzameno la studentoj de la du kursoj ricevas universitatan diplomon.

30. *Wuhan (Hubei): a) Huazhong-a Normala Universitato / *Huazhong Shifan Daxue, Wuhan, Hubei*; b) Docentoj Zhang DANCHEN kaj Cao DONGHAI (P); c) Dua fremdlingvo elektebla inter la angla, rusa, germana, franca kaj japana lingvoj; kadre de la Fakultato pri Fremdlingvoj; c/A) Ekde septembro 1980. Por studentoj de la 3a kaj 4a jaroj; 2 jaroj, 4 h/sem; c/B) Ekde septembro 1986. Por magistriĝaj studentoj (licenciuloj); perfektiĝo, E-krestomatio, tradukado, verkado, bazaj scioj pri analiza gramatiko, interlingvistiko; unu jaro, 6 h/sem.

F R Germanio

La kurso ne plu okazas ĉe *Hans-Kraut-Geweißeschule* en VS-Villingen, laŭ sciigo de s-ro J. SCHIFFER (20-06-1987).

Pollando

5. *Kraków: a) Jagiellona Universitato, Lingvinstrua Fakultato / *Studium Praktycznej Nauki Języków Obcych Uniwersytetu Jagiellonskiego, ul. sw. Anny 6, III p., PL-Kraków*; b) D-ro Leszek KORDYLEWSKI; c) Funkciis jam antaŭ la dua mondmilito. Lektorato, nedeviga sed ekzamena objekto kun enskribo en la studkajero. Ĉiusemestre, unu grupo de interfakaj studentoj; 2 h/sem.

● **2-a Internacia Akademia Konferenco pri Scienco kaj Tekniko en Esperanto**

Funkciiganto: Ĉina Akademio de Sciencoj
Organizanto: Sciencist-Teknikista Esperanto-Asocio sub la Ĉina Akademio de Sciencoj, 52 Sanlihe, Beijing, Ĉinio.
Dato: 10 ĝis 16 aŭgusto 1988, Beijing, Ĉinio
Temo: La reciproka efiko inter scienc-tekniko kaj socio.
Informoj ĉe: S-ino Wang YUCHUN, Ĝenerala sekretario Esperanto-Asocio, Academia Sinica, 52 Sanlihe, Beijing, Ĉinio.

▲ **Internacia Metodologia Seminario de Esperanto-Instruistoj**

Organizanto: Pedagogia Sekcio de Ĉeĥa Esperanto-Asocio
Dato: Inter 20-a kaj 24-a de aprilo 1988
Loko: Strážnice
Temo: Evoluigo de la kvar komunik-kapabloj
Informoj ĉe: D-ro Vêra BARANDOVSKÁ, Volgogradská 41, CS-70400 Ostrava 3, Ĉeĥoslovakio

◆ **Internacia Foira Esperantista Renkontiĝo 1988** (IFER '88)

Organizanto: Organiza Komitato de IFER '88 de Kulturligo de GDR, Käthe-Kolwitz-Strasse 115, DDR-1010 Leipzig
Loko: Leipzig
Ĉeftemo: Homo kaj scienc-teknika revolucio

■ **Unua Intensiva Pedagogia-Metodika Kurso**

Organizanto: UEA kaj ILEI kun KCE
Dato: 29 junio ĝis 13 julio 1988
Celo: Rajtigo al Esperanto-kursgvidado laŭ la internacia unuigita programo de UEA-ILEI
Informoj ĉe: Kultura Centro Esperantista, Poŝtfako 779, CH-2301 La Chaux-de-Fonds (Svislando)

La kurso okazos laŭ la *instruprogramo de UEA-ILEI.* La studado intensiva (6 horojn ĉiutage) finiĝos per *praktikaj kaj teoriaj ekzamenoj* kaj per ricevo de la atestilo de UEA-ILEI rajtiganta gvidi internaciajn Esperanto-kursojn. La kurson rajtas partopreni personoj, kiuj bone scipovas Esperanton kaj posedas almenaŭ mezan edukitecon. ILEI komisiis la didaktikan ĉefgvidadon de la kurso al magistrino Irena SZANSER, metodologo pri fremdlingvo-instruado, kunlaboranto de la fremdlingva fako ĉe Varsovia Instituto por Klerigo de Instruistoj, kaj membro de la Eduka kaj Ekzamena Komisiono de ILEI.

La praktika ekzameno konsistos el prezento de modelleciono enhavanta ĉiujn ŝtupojn de leciono de miksa tipo, kun detala disvolviĝa skriba skizo kaj necesaj didaktikaj helpiloj. Diplomitaj instruistoj de fremdlingvoj povas esti liberigitaj de la partopreno en la kvin unuaj kurstagoj, kondiĉe ke ili sendu fotokopion de siaj diplomoj kune kun sia aliĝo. Tamen ili devos submetiĝi al la praktika kaj teoria ekzamenoj kiel la aliaj. La aliĝintoj al la kurso kunportu la enlandan devigan instruprogramon por la Esperanto-instruado (se ĝi ekzistas) kaj la plej ŝatatan Esperanto-lernolibron, por prepari surloke la disdividon de la instru-materialo por la Esperanto-kurso. Aliajn instrumaterialojn, precipe metodikajn, eblos aĉeti surloke.

Horaro: ALVENTAGO: Alveno matene – Unua manĝo 12.45 h – Kurso de 14.30 ĝis 16.00 kaj 16.30 ĝis 18.00 – Manĝo 18.30 –

Vespere memstudado. / SEKVAJ TAGOJ: Matenmanĝo 8.00 – Kurso de 9.00 ĝis 10.30 kaj 11.00 ĝis 12.30 – Manĝo 12.45 – Kurso de 14.30 ĝis 16.00 – Manĝo 18.30 – Memstudado dum la resto de la tempo. / DU ANTAŬLASTAJ TAGOJ: Okazos praktikaj provlecionaj ekzamenoj dum la kurs-horaro. / LASTA TAGO: Teoria parola primetodika ekzameno dum la antaŭtagmezo. – Fermo de la kurso kaj disdono de la atestiloj 15.00.

Prezoj: La tuta aranĝo (kurso, manĝoj kun trinkaĵoj, tranoktado en kvarlita ĉambro) kostas SF 810. Redukto por studento montranta atestilon: SF 50. Tranoktado en dulita ĉambro: SF 900. En unulita ĉambro: SF 1080. Redukto por diplomitoj ne partoprenantaj la unuan kvintagan periodon: 30%.

Aliĝo: Ĝis la fino de aprilo 1988, sendota al KCE (Svislando). Doni la ĉi-sekvajn sciigojn: Nomo familia, nomo individua, sekso, naskiĝdato, gepatra (ĉefa) lingvo, aliaj lingvoj (nivelo), profesio aŭ nunaj studoj, adreso, telefonnumero, dezirata tranokta aranĝo, dato kaj subskribo. Konfirmi la aliĝon per antaŭpago de SF 300 al poŝtkonto 23-2921-8 de la Kultura Centro Esperantista. Pagoj eblas per eŭroĉeko. (Oni listigos la aliĝojn laŭ alveno de la antaŭpago.)

● **Internacia Interlingvistika Konferenco**

Organizantoj: Lingvistika Instituto de la Hungara Scienca Akademio – Hungara Esperanto-Asocio – Esperanto-Fako de la Budapeŝta Universitato Eötvös Lóránd
Organiza Komisiono: KOUTNY Ilona, KOVÁCS Márta, NANOVÍSZKY György, WACHA Balász.
Dato: 15 ĝis 17 aŭgusto 1988
Loko: Budapeŝto, Hungario
Ĝenerala temo: "Struktura kaj sociolingvistika esploroj de Esperanto" laŭ jenaj subdividoj:

(a) Esploro pri la unuopaj niveloj de Esperanto (fonetiko, fonologio, morfologio, sintakso, semantiko); (b) Leksikologio, leksikografio, terminologio en Esperanto; (c) Area kaj tipologia analizoj de internaciaj lingvoj; (d) Sociolingvistikaj aspektoj de internaciaj lingvoj, lingvopolitiko; (e) Tipologio de lingvaj ŝanĝoj en internaciaj lingvoj, lingvopolitiko; (f) Komputika-kibernetika aliro al Esperanto.

Informoj ĉe: H.E.A., «SSEE», Pf. 193, H-1368 Budapest – Tel. ++ 36 1 564-093

La konferenco celas doni detalan analizon de internaciaj lingvoj ankaŭ el la vidpunkto de neesperantistoj. Konataj lingvistoj estas invititaj. Prelegos i.a: Victor SADLER (Nederlando), Claude PIRON (Svislando), Katalin HORVÁTH (Hungario), Chen YUAN (Ĉinio).

Pliaj prelegproponoj (kun resumo) estas atendataj ĝis la 25-a de aprilo 1988. Akceptitaj prelegantoj ĝuos senpagan partoprenon.

La prelegoj daŭros 20 ĝis 30 minutojn kaj ilin sekvos diskuto. Sesioj okazos antaŭtagmeze 9-12 h kaj posttagmeze 14-17 h. La prelegotekstoj aperos post la konferenco.

Oficialaj lingvoj: Esperanto kaj la angla.

Interkona vespero kun vespermanĝo okazos la 15-an de aŭgusto je la 7a horo

Kotizo: (Kun interkona vespero kaj la konferenca eldonaĵo) 700 forintoj aŭ 50 DM ĝis 31 majo. Post tiu dato la kosto altiĝas je 10%. — Partoprenantoj el socialismaj landoj sendu la sumon al la hungara konto de HEA "OTP, VIII 2 18-98086/516-10 005" aŭ pagu surloke. — Partoprenantoj el okcidentaj landoj pagu al la konto «heaa-l» de HEA ĉe UEA, Nwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, aŭ al ties pĉk 378964.

Post tiu ĉi konferenco okazos anglalingva konferenco pri **"Novaj direktoj en maŝina tradukado"**, organizita de la nederlanda firmao BSO kaj la Hungara Komputoscienca Asocio NJSZT kun interesaj prelegoj, ankaŭ pri la rolo de Esperanto en la menciita kampo.

▼ Ĵus aperis **"Studoj pri la Internacia Lingvo"** (*Etudes sur la langue internationale — Studies on the International Language*), eldonata de AIMAV (Internacia Asocio por la Evoluigo de Internacia Komunikado), Gent 1987. 155 p.

Ĝia enhavolisto mencias: Antaŭparolo de M. DUC GONINAZ — J. LEYK: "La Esperanta socio fronte al la ekstera medio" — U. LINS: "Marxismus und internationale Sprache" — D.L. GOLD: "N.Z. Maimon's *La kaŝita vivo de Zamenhof*" — R.E. WOOD: "The Development of Standard Phonology in Esperanto" — P. JANTON: "Latentaj strukturaj trajtoj de la Esperanta gramatiko" — R. ROKICKI: "Leksemstrukturaj aspektoj klasifiki la Esperantan morfemaron" — I. SZERDAHELYI: "Principoj de Esperanta etimologio" — M. DUC GONINAZ: "Problèmes sámantiques et sociolinguistiques dans l'usage de l'espéranto" — C. PIRON: "Créativité et expression linguistique".

Mendebla ĉe: UEA (NLG 39 + 5) kaj ĉe Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen (BEF 700 + 50 — pĉk 000-0265338-43).

■ **ESPAROL paroligas vian komputilon Esperante**

En la Budapeŝta Teknika Universitato esploristoj ellaboris la aŭtomatan sintezon de Esperanto. Ilia sistemo ESPAROL povas eldiri kun konvena intonacio ĉiujn Esperantajn tekstojn skribitajn laŭ la normala ortografio. Ĝi prononcas ankaŭ ciferojn kaj aliajn specialajn simbolojn troviĝantajn sur la klavaro. Per simpla programo en la programlingvo BASIC oni povas voĉigi pli longajn tekstojn ankaŭ kun variabloj, paroligi la maŝinon diversrapide, flustre aŭ raŭke, eĉ eblas enprogrami kantojn. La sistemo konsistas el aparato kongrua kun mikrokomputilo *Commodore* tipo 64 aŭ 128, kaj el programo sur disketo. (Tiu ĉi aro estas vendata

kontraŭ DM 350.) Varianto por IBM persona komputilo kaj al ĝi kongruaj tipoj estas evoluigata. (En tiuj enmetebla karto kun programo kostos ĉ. DM 550.) Laŭ nia scio ESPAROL estas la unua parolsinteza produkto por vaste uzataj mikrokomputiloj.

Eblas konekti la sistemon al optika legilo, ellaborita en la hungara komputika esplorinstituto SZKI. Tiel, malbone vidantaj aŭ okupitaj homoj povas aŭskulti komputile laŭtlegatajn tekstojn. Ĉiu uzanto povas mem fari simplajn BASIC-programojn por ŝanĝi la parolkapablon de la maŝino laŭ sia persona deziro.

Pluaj informoj haveblas ĉe: I. KOUTNY, Budapeŝta Teknika Universitato, Stoczek u.2, H-1111 Budapest.

● **Opus Nigrum** — Aperis la numeroj 1987/3 kaj 1987/4 de la revuo eldonata en la Esperanto-fako de la Universitato ELTE. La dulingva, ĉefe literatura periodaĵo enhavas Esperante i.a. originalaĵojn de Georgo KAMAĈO, Marco DUTRA, Meva MARON, tradukojn el la rusa verkisto KUPRIN kaj la hungara poeto Imre ORAVECZ. La numeron 1987/4 plenigas la integra hungara traduko de *La Infana Raso* de William AULD. Interesiĝantoj, ankaŭ por ekzempleroj, turnu sin al la redaktejo, kies adreso samas kun tiu de IPR. Kontribuaĵoj beletraj (plej prefere tradukoj el 'malgrandaj' lingvoj), sed ankaŭ esperantologiaj kaj primovadaj, estas bonvenaj.

◆ Ĉu vi jam havas **"membrigilon" de ILEI**? Dank'al subvencio de la Eduka Fondaĵo Carson eldoniĝis aŭtune alloga kaj propagandiva faldfolio pri la celoj, sekcioj, membraro, konferencoj, periodaĵoj, rilatoj kaj planoj de ILEI. La efikan informilon vi povos bone uzi por diskonigi la agadon de ILEI. Bonvolu tamen uzi ilin ŝpareme, individue, por seriozaj interesiĝantoj. Akirebla ĉe: Grafika Centro, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen.

▼ **16-a Scienca Interlingvistika Simpozio**.

Organizanto: Akademia Centro Interlingvistika, Rada Naczelna ZSP, ul. Ordynacka 9, PL-00-950 Warszawa, Pollando.
Dato: Inter 27 aprilo kaj 1 majo 1988
Loko: Ripozkvartalo apud Varsovio
Temoj: Kultura kaj socipolitika aspektoj de la lingvoplanado — Sociologio de internacia planlingva parolkomunumo — Specifeco de Esperanto rezultanta el ĝia planiteco — Strategiaj demandoj de interlingvistiko

AL SEKCIESTROJ KAJ MEMBROJ DE ILEI

Kiel anoncite en Varsovio, la redaktisto de IPR nun petas vian skriban opinion pri la revuo:

1. Kiujn artikolojn vi aparte ŝatis en 1987 (aŭ antaŭe)?
2. Kiujn artikolojn vi aparte malŝatis en 1987 (aŭ antaŭe)?
3. Kio mankas en IPR?
4. Ĉu la proporcio de teoriaj kaj praktikaj artikoloj taŭgas? Se ne, en kiu senco ĝi maltaŭgas? [Vd la supran leteron]
5. Ĉu IPR temu plie pri la instruado de Esperanto aŭ pri instruado ĝenerale?
6. Kion pri la rubrikoj "Librobreto, Forumo, Aktualaĵoj" ktp? Ĉu necesas novaj?
7. En IPR mankas "Leterkesto", mankas recenzoj por "Librobreto" fare de legantoj, mankas reagoj. Tio dependas de vi.
8. Anstataŭ sur porokazaj kontribuantoj, estus pli bone kaj pli aktuale bazi IPR-on sur fidinda reto de landaj kaj regionaj informantoj, liverantoj de artikoloj. Anoncu vin!

Ĉu iuj artikoloj de IPR ne taŭgus por nacilingvaj fakrevuoj? Traduku, aperigu kun fontindiko kaj informu IPR-on pri la publikigo.
Kun respektaj antaŭdankoj,

via redaktisto István ERTL

Stipendio

De persono, kiu volas resti nekonata, la kasisto de ILEI ricevis monsumon por stipendio(j) al partoprenant(in)o de infankongreso aŭ simila aranĝo, kie infanoj de diversaj landoj renkontiĝas kaj per Esperanto amikiĝas. La donacinta persono atentigas pri tio, ke la mono estas akirita per diligenta kaj malfacila laboro kaj simpla vivo.

La lernant(in)o devas esti diligenta kaj en aĝo de lernantoj *en la deviga lernejo.* Mi atendas esperantlingvan raporton de la stipendiul(in)o post la partopreno de la infanrenkontiĝo kun respondo je ekzemple jenaj demandoj: Kio okazis dum la kongreseto? Ĉu vi trovis amik(in)on? El kiu lando li/ŝi estis? Kio plaĉis al vi plej multe? k.t.p. La membro-instruist(in)o, kiu deziras peti stipendion por infano en sia kurso devas respondi jenajn demandojn:

1. En kiu infanrenkontiĝo vi intencas partopreni? (kiam, kie, aranĝanto, adreso).
2. Kiuj estas la nomo kaj adreso de la infano (li aŭ ŝi)?
3. Kiomjara estas la infano?
4. Ĉu la infano bone povas konversacii en Esperanto kun samaĝuloj pri temoj rilatantaj al la infana aĝo?
5. Ĉu la infano estas diligenta kaj ne-riĉa?
6. Kiom kostas la restado de la renkontiĝo?
7. Kiom kostas la vojaĝo (tien kaj reen) al la renkontiĝo? (Prefere en svedaj kronoj aŭ germanaj markoj).
8. Ĉu vi promesas sendi esperantlingvan raporton pri la renkontiĝo al mi, ene de unu monato post la fino?

La peton pri stipendio bonvolu sendi minimume tri monatojn antaŭ la komenciĝo de la renkontiĝo al s-ro Olle OLSSON, Sodra Esplanado 23, S-223 52 Lund.

Espereble simila stipendio estos disdonita venontjare!

ESTRARO DE LA LIGO

Prezidanto : Szerdahelyi István [†]
Vicprezidanto : Symoens Edward, Putsesteenweg 131/A, B-2180 Heide (Kalmthout)
Sekretario : Dazzini Catina, Casella Postale 22, I-54100 Massa
Vicsekretario : Bâcev Marin, BG-1000 Sofio, Pf. 1054
Kasisto : Andreasson Bertil, Södra Rörum pl. 455, S-24200 Hörby

HONORAJ MEMBROJ

Zlatnar Peter (YU, 1984) – Dazzini Mario (I, 1985) – Erbetta Marcel (CH, 1986)
Klemola Irja (SF, 1986) – Olsson Olle (S, 1986) – Toczyński Jozef (PL, 1986)
Sonnabend Helmut (D, 1987)

SEKCIESTROJ DE LA LIGO

Aŭstralujo : Annie Spencer, 3/100 A Norman Cres., Norman Park, Queensland 4170, Australia
Aŭstrujo : Mag. Walter Klag, Rudolfinergasse 8/11, A-1190 Wien
Belgujo : Marc Demonty, Schoolstraat 3, B-1710 Dilbeek
Brazilio : Elvira Fontes, Rua Machado de Assis 243, ap. 11, BR-04106 São Paulo SP
Britujo : Arnold Pitt, Yew Tree Cottage, Irvington Road, Leominster, Herefordshire HR6 82D
Ĉinujo : Zhang Danchen, Huazhong Normal University, Wuhan
Danujo : Lis Thune, Brembärvänget 15, DK-2650 Hvidovre.
Finnujo : Pentti Järvinen. Lähdekorvenk 4, SF-33820 Tampere 82
Francujo : Claude Nourmont-Moon, 2 Om Kläppchen, L-5682 Dalheim (provizore)
F.R. Germanujo: Stefanie Tucker, Lilienthalstr. 3, D-6900 Augsburg
Grekujo : K. Koliopoulos, Plateia Pagratiou 5, Strato Pyrou 28, GR-11635 Ateno
Hispanujo : Manuel López Hernández, Sol 75, E-41003 Sevilla
Hungarujo: : Márta Kovács, Ady E. u. 23-25/C, H-1221 Budapest
Israelo : Josef Murĵan, P.K. 1289, IL-61012 Tel Aviv
Italujo : Catina Dazzini, C.P. 22, I-54100 Massa
Japanio : c/o J.E.I., Waseda-mati 12-3, Sinzyuku-ku, Tokyo
Jugoslavio : Sonja Tavčar, Liminijanska 6, YU-66320 Porotoroż
Korea Resp. : Gilsu Su, Sodaemun, P.K. 59, Seoul-120
Nederlando : D. Luesken-Burger, Renderklippenweg 5, NL-8162 NC Epe
Nordameriko : John C. Birmingham Jr, 5201 Patterson Ave, Richmond VA 23226, USA
Norvegujo : Odd Tangerud, (proviz.) Lillebo, Horgenvegen, N-3300 Hokksund
Pollando : Irena Szanzer, Lewartowskiego 9 m. 17, PL-00 185 Warszawa
Portugalio : Alexander Kasesa, Rua Actriz Palmira Bastos 10, 4'B, P-1900 Lisboa
Sanmarino : Marina Michelotti, Contrada del Collegio 51, I-43031 San Marino
Sud-Afriko : Axel von Blottnitz, Marcolaan 8, 1700 Florida Glen
Svedujo : Bertil Andreasson, Södra Rörum pl. 455, S-24200 Hörby
Svisujo : Edgar Jobin, F.W. Dubois 11, CH-2400 Le Locle
Venezuelo : J.E. Bachrich, Apartado 3833, Caracas 1010 A
Zairio : Ngangu Nduantoni-Bakidila, B.P. 13, Lukala (Bas-Zaïre)

REPREZENTANTOJ

Argentino : Alfredo Juan Valle, Santa Fé 497, RA-1708 Morón (B.A.)
Ĉeshoslovakio : Vêra Barandovská, Volgogradská 41, CS-70400 Ostrava 3
Nigerio : Godwin Oboh, University of Ekpoma Wan, Illeh Box 62, Ekpoma Bendel
Vjetnamio : Le Phuo'ng Nam, To Thong Tin Xuat Ban, Phong Khoa Hoc, Đai Hoc Cân Tho', Hâu Giang

LABORKOMISIONOJ

Statistiko : Pirlot Germain, Kemmelbergstraat 5, b. 3, B-8400 Oostende

Didaktikaj lud(il)oj : Sossois Georges, rue de la Consolation 2, B-6400 Couvin

KUNLABORANTAJ INSTITUCIOJ

UNESKO : (Rilatoj de reciproka informado, Kategorio C)
: 7 Place Fontenoy, F-75007 Paris.
Reprezentantoj de ILEI:
Fairbank James, 6 Avenue Th. Rousseau, F-75016 Paris
François Lo Jacomo, 14 rue de la Pompe, F-75016 Paris

FIMEM : Fédération Internationale de Mouvements d'Ecole Moderne, 35 Avenue Jottrand, B-1030 Bruxelles

ICEM : Institut Coopératif de l'Ecole Moderne, Le Pallet, F-44330 Vallet

UEA : Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam

SAT : Sennacieca Asocio Tutmonda, 67 Avenue Gambetta, F-75020 Paris

EC : Esperanto Centro, Pf. 1450, D-4790 Paderborn

EEC : Eŭropa Esperanto Centro, Schotlandstraat 73, B-1060 Brussel

IEI : Internacia Esperanto-Instituto, Riouwstraat 172, NL-2585 HW Den Haag

IKS : Internacia Kultura Servo, Pf. 499, YU-41000 Zagreb

KCE : Kultura Centro Esperantista, BP 771, CH-2301 La Chaux-de-Fonds

KSM : Koresponda Servo Mondskala, "Les Hortensias", 121 bis Boulevard Napoléon III, F-06200 Nice

Kontribuajoj al IPR

sendendaj en du ekzempleroj, tajpitaj, al la adreso de la Redaktejo (vd. kovrilpaĝon)

Abonado al IPR kaj membriĝo al ILEI:

(membrokotizo 40 Svedaj Kronoj)

1) poŝtĝirkonto: 682117-7 (Stockholm). «La Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj» (ILEI). Södra Rörum pl. 455, S-242 00 Hörby (Svedujo).
2) poŝtĝirkonto: 3789 64 — ILEI 2814 — UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam (Nederlando)